V-4252/76 (1983)

1983 septembro
76a jaro
n-ro 933 (9)
aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Giganta Kongreso en Budapeŝto

Vi trovos,

ke al ĉi tiu numero pli kontribuis la fotistoj (precipe Zoltán Fejér), ol tion faris la redaktoro kaj liaj raportistoj. Tamen, la fotistoj neniel kontribuis al la mulfrua apero de la revuo! Ha, kiel ni envias la fotistojn. Se oni povus tiel facile kaj nete verki, kiel oni fotas: butonpremo — kaj jen la rezulto. Cetere, kiam okazas kvinmilopa Kongreso, ne pensu, ke eblas ĝin ŝtopi en 24 revupaĝojn. Vi trovos (p. 156), ke pluraj kongresaj raportoj sekvos en oktobro. Se vi ankoraŭ entute pretas kredi al ajnaj redakciaj promesoj, tiam atendu la oktobran numeron tre baldaŭ. Ĝis!

Enhavo

141 68a Universala Kongreso de Esperanto: Budapeŝto por modelo kaj inspiro (S. Milojević)
142 Solena Inaŭguro: Etoso, kiu eniras la historion;
Salutparolado de la Alta Protektanto de la 68a UK: Unu el la plej noblaj, plej purintencaj movadoj (Sándor Gáspár)
145 Inaŭgura parolado de Richard E. Butler: Monda Komunika Jaro kaj malŝlosiloj al komunikado
146 Parolado de Humphrey Tonkin: Sen lingva interkomprenĝo la maŝinaro estos senpova
149 Malferma Solenaĵo: Planteto iĝis granda arbo
William Auld: UEA 75-jara (poemo)
151 Komitataj kaj estraraj kunsidoj: Sub la signo de la elektoj
Maksimuma atento al la Jubileo (Rezolucio)
152 La nova Komitato de UEA (nomlisto)
Resti en kontakto kun la moderna komunika teknologio (Rezolucio)
153 Novaj honoraj membroj
Por pli justa, pli demokrata lingva ordo (Rezolucio)
154 Unua Ĝenerala Kunsido: Publiko en la Komitato
155 Belartaj Konkursoj de UEA 1983: Rezultoj
Internacia Kongresa Universitato: Homa menso kiel ĉeftemo (Charles R.L. Power)
156 Esperantologia Konferenco: Ĉefe pri leksikologio (G. Sutton kaj W.A. Verloren van Themaat)
157 Solena Fermo: Digna fino de granda Kongreso
158 TEJO-paĝo: 39a Internacia Junulara Kongreso: Serioze labori kaj serioze amuziĝi (Norberto Saletti)
159 Junularaj aranĝoj: Katido kaj satiro (V. Seguru)
160 Kongreseroj...

La kovrilo

Antaŭ amaso da jaroj, kiam la redaktoro kun knaba vervo eklernis la zamenhofan lingvon, li ĉeestis jarkunvenon de loka Esperanto-klubo. Oni petis poste verki eseeton pri tiu kunveno. La ĉefa "tezo" de tiu teksto de komencanto parolis pri revo, ke la Internacia Lingvo meritas kunvenojn kun miloj da homoj en grandaj sportaj stadionoj, anstataŭ la eta klubejo en la strato de Matija Gubec, numero 27, en Zemun (Jugoslavio). La 68a Universala Kongreso de Esperanto havis tian ejon el niaj revoj. Rerigardu al la kovrila ĉefbildo kaj serĉu en ĝi plenumiĝon ankaŭ de viaj propraj revoj ĉi-rilate. Konstatu, ke ni ja progresas, kaj ke valoras plubatali. Supozeble, vi rekonas kovrile ankaŭ la (mal)novan prezidanton de UEA, Grégoire Maertens.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo varias laŭlande (Gld. 39; US $ 18; GM 36; enoj 3150 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 000, 1/2 p. 530, 1/4 p. 290, 1/8 p. 170, 1/16 p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50 %. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20 %.

Banko: Bank Mees & Hope, Coolsingel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:
ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto (financo, administrado): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; ☎ (050) 35 49 35.

Vicprezidanto (esploroj, rilatoj kun UN): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; ☎ (315) 265 6744.

Vicprezidanto (informado): s-ro Yosimi Umeda, Tabata 1-28-13-206, Kita-ku, Tôkyô, 114, Japanio; ☎ (03) 828 6603.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; ☎ (72) 23 274.

Estrarano (planado, Jubilea Jaro, landa agado): d-ro Renato Corsetti, Via Collazia 21/1, I-00183 Roma, Italio; ☎ (06) 75 85 679.

Estrarano (eksteraj rilatoj, junularo): d-rino Barbara Despiney, 30 bvd. de Strasbourg, F-94130 Nogent sur Marne, Francio; ☎ (1) 873 18 27.

Estrarano (kongresoj): s-ro Roland Lindblom, Stenbockens gata 109, S-136 62 Handen, Svedio; ☎ (08) 777 41 75.

Estrarano (kulturo, edukado): s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; ☎ (91) 3 73 01.

Estrarano (faka agado, aplikado de Esperanto): inĝ. Petâr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; ☎ 65 52 43.

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KRAKÓW

Maandelijks tijdschrift "Esperanto", nr. 933 (9), sept. 1983. Verantwoordelijke uitgever: G. Maertens, Pr. Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge.

Budapeŝto por modelo kaj inspiro

La 68a Universala Kongreso de Esperanto, de la 30a de julio ĝis la 6a de aŭgusto 1983, en la hungara metropolo Budapeŝto, estis la plej amasa manifestacio en la historio de la Internacia Lingvo. Kvankam vi legos aliloke en ĉi tiu revuo, ke la nombro de la aliĝintoj eventuale estis 4 834, kaj trovos en aliaj movadaj periodaĵoj informon, ke tiu nombro estis, ĉu 5 011, ĉu 5 045, restas ekster ĉia dubo, ke dum la kongresa semajno en Budapeŝto ĉeestis kaj partoprenis tiom da esperantistoj, ke ili je pluraj centoj superis la nombron de 5 000. Estus historia maljustaĵo, se la definitiva nombro saldiĝus alimaniere.

Organizi tiel gigantan Kongreson estis defio, kiun eble neniu alia urbo en la mondo kapablus fronti kun tia sukceso, kian rikoltis Budapeŝto kaj Hungara

Foto: Z. Fejér



Esperanto-Asocio (HEA), kiu demonstris al ni grandegajn organizajn potencialon kaj flekseblecon.

Sonu eĉ paradokse, sed la 68a UK estis la plej neŭtrala Kongreso en nia memoro. Kun maksimuma kunlaboro de HEA, Loka Kongresa Komitato kaj ŝtataj instancoj, la neŭtraleco de UEA kaj ĝiaj Kongresoj montriĝis en Budapeŝto esti kvazaŭ ia paranojo de aliaj, kaj nepre ne aktuala demando de la unueca internacia Esperanto-movado. Ne nur, ke la enirvizon ricevis ĉiu petinto (i.a. dekoj da kongresanoj el Israelo kaj Suda Koreo, kun kiuj Hungario ne havas diplomatiajn rilatojn), sed la organizantoj trovis la formulon laŭ kiu leviĝis nek en kunvenoj nek en presaĵoj ajna demando, kiu lezus la neŭtralecon, tiun fundamentan principon de la Statuto de UEA.

Ni povus elnombri almenaŭ dekon da kialoj pro kiuj la 68a UK fariĝu nia modelo kaj inspiro (riĉega kaj varia programo, perfekta loĝiga servo, ideala situo de bonega kongresejo, multaj kaj bone organizitaj ekskursoj, luksa kaj abundega dokumentaro, novstilaj programeroj ktp). Ni volas tamen elstarigi unu aspekton de la Kongreso, ĉar ni kredas, ke ĝi redonas la sencon kaj esencon al la plej granda movada manifestacio: Verŝajne ne troveblas ne nur budapeŝtano sed ankaŭ hungaro ĝenerale, kiu ne aŭdis aŭ vidis, ke ni kongresis en Budapeŝto komence de aŭgusto. La atento, kiun al la 68a UK donis la hungaraj (kaj alilandaj) gazetaro, radio kaj televido estis grandioza kaj tute senprecedenca. Ni dirus, ke tio estas la ĉefa kaj la plej valora rekordo, kiun portis al ni la tria UK en Budapeŝto.

Mankoj ne mankis en Budapeŝto ankaŭ (vicoj antaŭ la giĉetoj, ekzemple), sed ili facile kaj rapide forgesiĝas en ĉi tia resuma rerigardo. Tamen, ne devus esti tiel. Kiam ni foje spertas bonan funkciadon de la giĉetoj (ekzemple en Lucerno), la solenecon de la Inaŭguro (Varno, Brazilio), sukcesan gazetaran servon (Hamburgo, Stokholmo), idealan teatran prezenton (Rejkjaviko), perfektan libroservon (Lucerno, Stokholmo, Brazilio) aŭ eĉ dignan bankedon (Stokholmo), ni devus certiĝi, ke la organizantoj de la estontaj Kongresoj lernu tiujn lecionojn. Sed, la ĉefa manko de la 68a UK estis io tute alia, kio direktiĝas al UEA, kaj ne al LKK: La aliĝkotizoj por la hungaroj kaj aliaj orienteŭropaj esperantistoj estis tiaj, ke ili ofte egalis al duono de la monata enspezo de laboristo aŭ pensiulo. Estas io en malordo ĉi-kampe. Devus ekzisti maniero rezigni pri kvin el dek teatraĵoj, por ebligi al plia milo da esperantistoj realigi sian vivorevon pri partopreno en Universala Kongreso. Se ni vere okazigos la 71an UK en Pekino post du jaroj, ni devus trovi manieron por fiksi aliĝkotizon en rizgrajnoj, alie povus komplete manki al ni tie enlandaj kongresanoj.

Budapeŝto sekure nestas en la memoro de la partoprenintoj de la 68a UK. Larĝaj bulvardoj, abunde ornamitaj per Esperantaj flagoj kaj bonvenigaj sloganoj. Mirakle bela urbo duurba ĉirkaŭbrakas la potencan Danubon. Azidevena popolo meze de Eŭropo per la 68a UK emfazas sian eminentan rolon en la vivo de la Internacia Lingvo. Budapeŝto liveras al ni modelon kaj inspiron.

S. Milojević

Etoso, kiu eniras la historion

Tiu lasta dimanĉa mateno de julio ĉi-jare eniris la historion de la Esperanto-movado jam antaŭ la komenciĝo de la Solena Inaŭguro de la 68a Universala Kongreso de Esperanto. Ni parolas pri la antaŭinaŭgura etoso en la giganta sporta halo, kiu transformiĝis en la kongresejon. Nia historio neniam antaŭe notis esperantistan kongreson aŭ alian manifestacion, kiu samloke, en unu ejo arigis preskaŭ 6 000 partoprenantojn kaj gastojn. La nomo de Zamenhof neniam antaŭe ornamis salonegon de tiaj mamutaj dimensioj, kiel okazis en Budapeŝto.

Oni sidis tie kaj demandis sin, ĉu oni estas en erara loko, kie post momento ensceniĝos giganta sporta aŭ popmuzika spektaklo. Por malkonfuzi nin, staris tie, super la podio, la konata 36-jara Kongresa Flago. Sed ankaŭ ĝi malkomfortis, ĉar ĝi estus devinta kvarobliĝi por elvoki la saman dekoran efekton, kiel en la ĝisnunaj Kongresoj. Super la Flago grandlitera nomo de la Kongreso, dekstre kaj maldekstre ruĝo-blanko-verdo de la hungara nacia flago. Tute supre, ambaŭflanke, grandioza girlando el 52 naciaj flagoj de ĉiuj landoj el kiuj venis la aliĝintoj de la Kongreso. Ĉio ĉi sur enorma malhela kurteno, kiu dividis la stadionon por transformi ĝin en konvenan kongresejon. Inter la 52 naciaj flagoj pendas ankaŭ tiuj de tri landoj kun kiuj Hungario ne havas diplomatiajn rilatojn, kaj tio estas la plej granda komplimento, kiun la gastiganta lando povis fari al la politika neŭtraleco de la Kongreso.

Dum 60-membra blovorkestro, dekstre de la podio, provas venki la ejodimensiojn, de maldekstre eniras plurdeko da registaraj, diplomataj kaj aliaj gastoj. Fanfaro, kaj eniras la podianoj. Meze sidiĝas la prezidanto de UEA, Grégoire Maertens, kaj la alta protektanto, Sándor Gáspár. Tie estas ankaŭ la prezidanto de la Honora Komitato de la Kongreso, István Sarlós. Malmultaj kongresanoj konscias, ke tiuj du hungaraj eminentuloj apartenas al politike plej altranga triopo de la gastiganta lando. Sur la podio estas ankaŭ ĉiuj estraranoj de UEA kaj pluraj aliaj eminentuloj de la hungara kaj internacia Esperantomovado.

Leviĝas la prezidanto de UEA kaj per mallonga alparolo malfermas la 68an Universalan Kongreson de Esperanto. Li citas en tiu parolado la vortojn, kiujn la fama hungara poeto Endre Ady verkis verŝajne komence de la jarcento (1906?). Tiu trafa citaĵo konsterne aktualas post tiom da jardekoj, ĉar Ady diris: "... Hungario devus stari en Eŭropo kape de ĉia internaciismo. Nian vivon sole la internaciismo povas savi. Jen kial la problemo de la internacia lingvo estas monstre hungara problemo." Maertens atentigas, ke la vizio de Ady "konkretiĝis en la hungara Movado, kiu generis gigantojn de la Esperanta literaturo, praktikas regulan edukadon en la Internacia Lingvo kaj organizas kolosan Universalan Kongreson."

La parlamentano Endre Baráth, prezidanto de LKK, bonvenigas nome de la organizantoj. D-rino Flóra Szabó-Felső, ĝenerala sekretario de UEA, pre-

SALUTPAROLADO DE LA ALTA PROTEKTANTO DE LA 68a UNIVERSALA KONGRESO:

Unu el la plej noblaj, plej purintencaj movadoj

Estimata Kongreso!

Sinjoro prezidanto estis afabla prezenti al vi ankaŭ min, kaj li, krome, elnombris kelkajn miajn funkciojn, kvankam ne ĉiujn. Mi mencias tion, ĉar mi volas saluti la Kongreson en la nomo de pluraj instancoj. Kaj se jam menciiĝis miaj pluraj funkcioj, mi rimarkigu, ke funkciojn mi havas ja plurajn, sed salajron nur unu.

Foto: Z. Fejér



Belaj, sinceraj vortoj: Sándor Gáspár

Foto: Z. Fejér



La soleneco de la podio dum la Inaŭguro (tute dekstre sidas la hungara kosmonaŭto kaj esperantisto B. Farkas)

zentas la podianojn. La scenejon invadas kelkdeko da partoprenantoj de la 20a Internacia Infana Kongreseto kaj inundas ĝin per floroj por la podianoj. Nóra Csíszár, 10-jara hungarino, aliras la mikrofonon kaj diras: "Estonte kunprenu viajn gefilojn, parolantajn Esperanton, ĉar ĉi tie en la Infana Kongreseto ni estas tre malmultaj, kompare al vi."

Parolvico al la Alta Protektanto, kiu salutas spontane kaj bele, kiel malofte kutimas altrangaj politikistoj. En kelkminuta paŭzo oni distribuas la Esperantan tekston de la prelego, kiun tiam faras (anglalingve) Richard E. Butler, ĝenerala sekretario de Internacia Telekomunika Unio. D-ro Humphrey Tonkin komplementas tiun paroladon kaj atentigas pri la rolo de

En la nomo de la Prezidio de Hungara Popolrespubliko, de la hungaraj sindikatoj, kaj de la loĝantaro kaj gvidantoj de la hungara ĉefurbo, estime kaj kore mi salutas ĉiujn partoprenantojn de la 68a Universala Kongreso de Esperanto. Mi deziras al la Kongreso krean, rezultoplenan, bonan laboron!

Ni ne scias kun plena certeco, ĉu la lingva konfuzo ekzistas jam ekde la tempo de Babelo, sed estas fakto, ke nun ni estas disdividitaj ankaŭ el lingva vidpunkto. Tiu lingva disdivideteco certe havas siajn historiajn kaŭzojn. Kaj ni scias kun plena certeco, kiaj intenco kaj celo gvidis tiujn, kiuj antaŭ preskaŭ cent jaroj metis la fundamentojn de la Esperantaj lingvo kaj movado. Niaj antaŭuloj havis la intencon — pri tio ni ne havas dubojn — per la kreo de komuna lingvo disponigi rimedon, eblon por tio, ke la homoj pli bone komprenu kaj estimu unu la alian. Niaj antaŭuloj deziris, ke ni faru komuna trezoro de la tuta homaro ĉiujn spiritajn valoraĵojn, kiuj akumuliĝis en nia mondo. Tiel, do, kiam ni parolas pri la Esperantomovado, ni parolas pri unu el la plej noblaj, plej pur-intencaj movadoj de la lastaj jardekoj.

Ĉiu honesta, bonintenca homo entuziasmiĝas, se li vidas la rezultojn de sia laboro. La adeptoj kaj disvastigantoj de Esperanto jam povas vidi rezultojn de sia valora socia laboro. Tial denove mi deziras al vi bonan laboron, kaj sukcesan, bonan kongreson.

Mi deziras. ke vi fartu bone en Budapeŝto, en Hungario, kie ni klopodis certigi ĉiujn kondiĉojn por la plenumo de via riĉa kongresa programo.

Mi deziras bonan sanon kaj multajn sukcesojn al vi ĉiuj!

Sándor Gáspár

Esperanto en la tutmonda komunikado. Ĉiuj ĉi paroladoj aperas aliloke en ĉi tiu revunumero.

Post prezento de la ĉeestantaj membroj de la Honora Komitato (fare de d-rino Szabó-Felső), Maertens salutas la diplomatojn: Aŭstrio: A. Riedel (dua sekretario); Belgio: S. Tielemans (ambasadoro); Brazilo: E. Leikes (nome de la ambasadoro); Bulgario: L. Tosev (dua sekretario); Ĉinio: Ma Lie (ambasadoro); Danlando: B. Mathiesen (ataŝeo); Egiptio: F.M. Ezz Eldin (unua sekretario); Finnlando: U. Hauhia-Nagy (kulturataŝeo); Francio: J-L. Zoel (unua sekretario); FR Germanio: H. Kerll (kulturataŝeo); Germana DR: U. Kittmann (kulturataŝeo); Italio: D. Ventola (kulturataŝeo); Jugoslavio: Milan Vereš (ambasadoro); Kanado: T.J. Arcand (ambasadoro); Norvegio: K. Gustavsen (nome de la ambasadoro); Pollando: J. Wojciechowski (konsilanto); Rumanio: V. Bolojan (ambasadoro); Soveta Unio: I. Badjul (konsilanto); Svedio: B. Hagström (unua sekretario); Svislando: R. Beaujon (ambasadoro); Usono: G. Forner (konsilanto); Vjetnamio: Ta Quynh (konsilanto). Inter deko da diplomatoj, kiuj alparolis la Kongreson, pleje surprizis la rumana ambasadoro (ĉar Rumanio malofte reprezentiĝas en niaj Kongresoj) kaj la unua sekretario de la Ambasadoro de Egiptio (ĉar li montriĝis mem esti kompetenta uzanto de la Internacia Lingvo).

D-ro Corsetti anoncis la skribajn salutojn de la registaroj, i.a. tiujn de la ĉefministroj de Aŭstralio kaj Nov-Zelando. Tonkin informis pri la ricevitaj salutoj de internaciaj registaraj kaj neregistaraj organizaĵoj. Post fermaj vortoj de la prezidanto Maertens, muziko kaj aplaŭdoj signis la finon de ĉi tiu impona inaŭgura solenaĵo.

Foto: Z. Fejér



La grandioza homamaso en la Solena Inaŭguro de la 68a UK estis por ĉiuj ĉeestantoj inspira atesto pri la progreso de niaj klopodoj kaj idealoj.

Rerigardante nun, plurajn semajnojn poste, al la budapeŝta Inaŭguro, ni konstatas, ke ĝi havis plurajn trajtojn de memorinda solenaĵo (la grandiozeco de la etoso, la rekorda nombro de altrangaj gastoj), sed ĝi ne fariĝis modelo por niaj Inaŭguroj. Mankis kompetenta reĝisora gvido kaj – plej okulfrape – la muzikaj eroj montriĝis neadekvataj por tia grandega kongresejo.

Monda Komunika Jaro kaj malŝlosiloj al komunikado

Foto: S. MacGill



Du inaŭguraj parolantoj pri la kongresa temo: Humphrey Tonkin (dekstre) kaj Richard E. Butler

Sinjoro prezidanto, gesinjoroj,

Estas plezuro por mi akcepti vian afablan inviton partopreni en la Inaŭguro de la Universala Kongreso de Esperanto. Foje iu diris, ke komunikado estas la komenco de ĉia interkompreno. Tiu dirajo bone povus esti devizo kaj por Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj por Internacia Telekomunika Unio (ITU).

Jam de sepdek kvin jaroj via Asocio senlace klopodas ampleksigi internacian komunikadon kaj komprenon, kaj interproksimigi la popolojn de la mondo per komuna lingvo.

Interkomunikado estas ŝlosila faktoro en la socia, ekonomia kaj kultura evoluo de la nacioj kaj por kompreno inter la popoloj. Kiel ofte lingvaj baroj kaŭzas miskomprenojn inter popoloj kaj nacioj – kaj tio okazas spite al senprecedenca teknologia evoluo kaj ties aplikado por tuja komunikado tra la mondo.

En tiu ĝenerala kunteksto, esencaj elementoj de la perilo koncernas ambaŭ niajn organizajojn pli ol la enhavo de la mesaĝo: vin, UEA, dum vi provas venki lingvajn barojn, por komuniki inter malsamaj nacioj kaj popoloj per la uzo de universala lingvo; nin, ITU, per teknologiaj rimedoj, por transsalti la distancojn kaj nuligi vojaĝtempon. La mondo de la komunikado estas forte konscia, ke nuraj teknikaj rimedoj ne donas efikan komunikadon. Devas troviĝi almenaŭ du homoj por ekkomuniko, kaj ni ĉiuj scias, ke se tiuj du homoj ne komprenas la parolojn unu de la alia, ne realiĝas komunikado.

Tio same veras por telekomunikaj sistemoj; la terminalaj ekipajoj, fabrikitaj de malsamaj produktantoj, kaj uzataj en malsamaj landoj, devas, inter certaj limoj, havi la samajn karakterizajojn por povi kune funkcii. Alivorte, ili devas esti funkcie akordigeblaj. La samo validas en la kazo de transmisiaj retoj de ĉiu lando, kiuj sen grandskala normigo ne povus esti kunligitaj por formi la nuntempan tutmondan telekomunikan retaron.

Tio, fakte, estas la historio pri la origino de ITU. Kiam oni inventis la elektran telegrafon en la jaroj ĉ. 1830, oni tuj komprenis, ke ĝi estas tute nova dimensio de komunikado, kiu povas venki la problemojn de distanco kaj vojaĝtempo, ĝis tiam nesupereblajn.

La funkcio de ITU, jam de ĝia komenco kiel Internacia Telegrafia Unio en 1865, estis krei la kondiĉojn, kiuj ebligus internacian interkonekton de naciaj retoj. Estas grave substreki tion, ĉar ne temis pri la starigo de internacia reto kiel io aparta disde naciaj retoj, sed temis pri certigo, ke estu grado de komuneco inter la naciaj retoj, tiel ke ili povu esti relative facile interkonekteblaj.

Tiu koncepto aŭ gvida principo validas jam de la plej simpla telegrafa ekipajo, kiu ekzistis en 1865, ĝis la modernaj telekomunikaj sistemoj, kiujn oni konsideras por estonta enkonduko.

La problemo krome ne limiĝas je la certigo de interakordebleco, sed oni devas ankaŭ teni komunikajojn apartaj, kie necesas. La invento de la radioricevilo kunportis la problemon de ĝena perturbado inter elsendejoj, kaj la fakto, ke radio-ondoj disvastiĝas laŭ la leĝoj de la fiziko kaj ne laŭ tiuj de la homo, tiel ke ili ne atentas homfaritajn landlimojn, signifas, ke ITU devas trakti la internacian planadon kaj kunordigon de la uzo de la radiofrekvenca spektro kaj per tio, certagrade, de la uzo de la spaco kaj speciale la terrilate senmova orbito.

Tamen, spite al ĉiuj ĉi grandaj teknikaj atingoj, la mondo multrilate ankoraŭ neniel sukcesas provizi eĉ minimuman telekomunikan servon al granda parto de la tergloba loĝantaro.

Fakte, la demando kiel provizi per eĉ la plej simpla telekomunikilo, je promena distanco, tre konsiderindan parton de la monda loĝantaro – tio prezen-

tas unu el la plej grandaj telekomunikaj problemoj kaj defioj de nia tempo.

La telefono, inventita antaŭ pli ol cent jaroj, estas ideala ilo. Ĝin povas uzi ĉiu, sed ĝi ankoraŭ ne multe influis la profunde kamparajn kaj forajn regionojn de la mondo. La kialo malantaŭ tio estas la kosto kaj certagrade la teknologio. Sed ni ne plu povas kulpigi tiujn faktorojn nun. La problemon oni povas solvi surbaze de kunlabora divido de rimedoj, sufiĉa prioritata investado kaj kunlaboro Nordo-Sudo kiel ankaŭ interne de la Sudo. Teknologio kaj kunlaboro ja povas tiel doni egalan aliron al komunikado por ĉiuj, kaj nun je malalta kosto.

En ITU mi rigardas la komunikadon kiel ilon por evoluigo, precipe socia kaj ekonomia. Ni povas, kompreneble, mezuri aŭ taksi ekonomian progreson rilate al la viv-nivelo kaj -kondiĉoj, kaj tiel ni alvenas al la komparo inter la "havuloj" kaj "malhavuloj" aŭ al tio, kio ofte nomiĝas la "evolu-breĉo".

La ciferoj klare parolas. En 1982 troviĝis proksimume 550 milionoj da telefonoj en la mondo kaj 600 milionoj da televidiloj. Proksimume 15 procentoj de la nacioj uzas 90 procentojn de ĉi tiuj telefonoj kaj televidiloj, dum 85 procentoj de la nacioj de la mondo devas elturniĝi kun la restantaj 10 procentoj. Ĉi-speca malekvilibro kondukis al tio, ke la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj proklamis la jaron 1983 Monda Komunika Jaro, kun la temo "Evoluigo de komunikilaj substrukturoj". La bazaj celoj, deciditaj de la Ĝenerala Asembleo de UN, estas "doni la eblecon al ĉiuj landoj entrepreni profundan esploron kaj

Foto: S. MacGill

analizon de sia politiko pri la evoluigo de komunikado" kaj "faciligi akcelan evoluigon de komunikilaj substrukturoj".

Rilate al la Jaro, ITU estis nomita de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj kiel la gvida organizaĵo por la aktivado de UN kaj ties specialaj organizaĵoj. La ĝenerala sekretario de ITU estas la kunordiganto de la Monda Komunika Jaro inter la UN-organizaĵoj, Unuiĝintaj Nacioj kaj la koncernaj specialaj organizaĵoj proksime kunlaboras kun ITU, por

---

PAROLADO DE HUMPHREY TONKIN:

Sen lingva interkompreniĝo la maŝinaro estos senpova

Karaj gekolegoj,

S-ro Butler atentokapte resumis por ni la celojn de la Monda Komunika Jaro kaj montris kiel la lingva demando rekte ligiĝas al la demando pri disvastigo de komunika teknologio. "La lingvo", li prave diris, "estas necesa elemento en la komunikado." Mi eĉ kuraĝus aserti, ke la lingvo estas la bazo de la komunikado, ke sen lingva interkompreniĝo la maŝinaro de la komunikado estas plejparte senpova. Per tio mi ne volas nei, ke maŝinoj povas komunikiĝi kun maŝinoj sen la pera rolo de homa lingvo. Mi volas nur atentigi, ke sen komuneco de lingvoj en la koncernaj cirkonstancoj, telefono estas senpova, televida aparato estas neuzebla, radio ne funkcias. Komuneco de lingvoj kuŝas ĉe la koro de la demando pri disvastigo de komunika teknologio.

Nia gasto atentigis, ke la subtitolo de la Monda Komunika Jaro estas "Evoluigo de la Substrukturoj de Komunikado". Per "substrukturoj" oni kutime komprenas la t.n. malmolaĵojn de la komunikado – la telefonaparatojn kaj telefonajn retojn, la televidajn dissendilojn, la satelitojn, la antenojn – ĉion, kion oni bezonas por krei la antaŭkondiĉojn, en kiuj komunikado fariĝas ebla. Sed ankaŭ la lingvo, kvankam ĝi ne estas palpebla kiel telefonaparato aŭ anteno aŭ elektra drato, konsistigas antaŭkondiĉon de la komunikado. S-ro Butler certe konsentus, ke oni ne povus krei telefonan reton el elementoj nenormigitaj. Se telefona aparato de unu fabrikanto ne estas ligebla al centralo de alia fabrikanto, kombine ili ne konsistigas komunikan reton. Same pri la lingvo. Se la homoj, kiuj uzos komunikan reton ne kapablas komunikiĝi inter si pro lingvaj diferencoj, tiu reto estas nur ŝajna reto: ĝi ne estas funkcianta reto, ĝiaj aparatoj estas senutilaj.

efektivigi vastan gamon da programoj, projektoj kaj agadoj por plenumi la celojn, deklaritajn de la Ĝenerala Asembleo de UN. Troviĝas apartaj roloj por Unesko kaj Universala Poŝta Unio, kiel ankaŭ por koncernaj uzantoj, kiel ekzemple: Monda Organizaĵo pri Sano, Organizaĵo Internacia pri Civila Aviado, Monda Organizaĵo pri Meteologio, Nutraĵa kaj Agrikultura Organizaĵo. Aldone, multaj neregistaraj organizaĵoj proponis sian subtenon. Ĉi-loke mi aparte ŝatus varme bonvenigi la ambician programon de via Asocio, kiu ellaboros fakterminaron por komunika teknologio. Mi estas certa, ke tiu entrepreno havos sekvojn, kiuj longe influados ne nur la verkadon en Esperanto kaj tradukadon de tekstoj pri komunikado.

La Monda Komunika Jaro tamen ne estas nur agado, kiu okazas sur la nivelo de internaciaj organizaĵoj, sed ĝi intime koncernas tion, kio okazas sur la nacia nivelo, ĉar la celo estas finfine plibonigi la aliron al komunikado por la ordinara homo.

Unuopaj registaroj starigis 63 naciajn komitatojn por plenumi la programon de la Monda Komunika Jaro en la koncernaj landoj. En multaj landoj tiuj komitatoj nun por la unua fojo enkondukas kompleksan kaj praktikan kunordigon sur la kampo de komunikado. Mi esperas, ke tiuj komitatoj estos antaŭuloj de konstantaj naciaj komitatoj por kunordigo.

65 ŝtatestroj akceptis aliĝi al Internacia Honora Komitato por doni sian patronecon kaj moralan subtenon al la celoj de la jaro.

Ĉio ĉi tendencas al plenumo de la celo "Unu mondo, unu komunika reto", kiu estis la celo ankaŭ de la ĉi-jara Monda Telekomunika Tago.

Tamen ni devas neniam pretervidi la malpli palpeblajn sed eble pli signifajn aspektojn de la komunikado.

La Internacia Komisiono por Studado de Komunikaj Problemoj, ofte konata kiel la Komisiono de MacBride [makbrajd], deklaris konklude (paĝo 258): "Evoluigaj strategioj devus enhavi komunikadan politikon kiel integran parton en la diagnozo de bezonoj kiel ankaŭ en la projektado kaj efektivigo de elektitaj prioritatoj. Ĉi-rilate la komunikadon oni devus trakti kiel ĉefan evoluigan rimedon..."

La Komisionon de MacBride oni ne rigardu kiel rezulton, sed kiel komencon. Ĝiaj konkludoj montras, fakte, bazan zorgon, kiu estas unu fundamenta celo de Monda Komunika Jaro, nome Evoluigon de Komunikilaj Substrukturoj, kiu donas al ĉiu el ni – laboranta per naciaj komitatoj aŭ per la programoj de la koncernaj internaciaj organizaĵoj – eblecon partopreni en la evoluigo de la komunikilaj substrukturoj tiel necesaj por la ekonomia, socia kaj kultura evoluo de la popoloj, kaj de ĉiuj ni – individue kaj kolektive.

Mi nun ŝatus diri ion pri la uzo de la lingvo. Mi havas du ĉefinteresojn pri la uzo de la lingvo: 1) la lingvo kiel la laborrimedo de internacia organizaĵo kaj 2) la lingvo kiel la komunika rimedo inter la korespondantoj en telekomunikaj sistemoj.

La lingvo estas necesa elemento en la komunikado. Kiel multe pli bona estus tergloba interkom-

---

En tiu senco la lingvo, same kiel la malmolaĵoj de la komunika teknologio, per si mem konsistigas substrukturon de la komunikado. Ĝi estas antaŭkondiĉo de la permaŝina komunikado.

Nuntempe la planantoj de komunikado dediĉas relative malmultan atenton al tiu ĉi demando, nome al la lingva dimensio en la evoluigo de la substrukturoj de komunikado. Sed ignori la lingvon, tio estas jam dikti difinitan politikon. Tio estas diri al la evoluantaj landoj, ekzemple: "Se vi volas uzi niajn aparatojn, vi uzu nian lingvon; se vi volas havi modernajn komunikajn rimedojn, vi transprenu nian lingvon, nian kulturon."

Necesas trovi vojon al tio, ke unuflanke la evoluantaj landoj plibonigu la kondiĉojn de la vivo, kaj aliflanke ili konservu siajn tradiciojn, siajn kulturojn. En la kruciĝo modernigo/konservado kuŝas la esenco de la debato nuntempa pri komunika teknologio kaj pri Nova Monda Komunika Ordo.

En la kruciĝo modernigo/konservado kuŝas ankaŭ la esenco de Esperanto. Unuflanke ni celas tutmondan lingvan komunikadon per unusola lingvo. Aliflanke ni celas konservi la malgrandajn lingvojn kontraŭ la superrego de la grandaj naciaj lingvoj. Senpensa perforta trudo de unu aŭ alia nacia lingvo ja povus krei unuecan mondan lingvan situacion – sed temus pri mondo, en kiu regus malegaleco, maljusteco, manko de kultura diverseco. Senpensa perforta trudo de komunika teknologio senkonsidere al lingvaj kaj kulturaj diferencoj ankaŭ povus rezultigi unuecon – sed unuecon je granda spirita kosto. Necesas ĉiam teni en memoro, ke la moderna teknologio povas, se ĝi estas juste, ĝuste kaj humane uzata, enkonduki novan egalecon inter la homoj. Se ĝi estas misuzata, se tiu fendo inter tiuj, kiuj havas kaj tiuj, kiuj ne havas, ne estas fermita, ĝi kondukos nur al malegaleco kaj subpremo.

Hodiaŭ, s-ro Butler, ni kunvenis por diskuti ĝuste la avantaĝojn, kiujn prezentas por la komunikado la moderna teknologio. Ĝi ebligas nivelon kaj kvanton de komunikado neniam antaŭe eblajn. Ni komune laboru por certigi, ke en tiu komunikado regu egaleco, demokratio kaj humaneco, ankaŭ sur la lingva tereno. Vi bele kaj instrue liveris al ni bazon por tiuj diskutoj.

Humphrey Tonkin

preno, se ni havus unu solan lingvon!

En la pasintaj kelkaj jaroj ni bonŝance vidis, aparte en landoj kun adekvataj edukaj rimedoj, ampleksigon de la instruado kaj lernado de fremdaj lingvoj, kio estas laŭdinda klopodo de individuoj kaj certagrade de nacioj.

Sur la internacia nivelo ni vidas la ampleksigon de lingva kunlaboro per la pliigo de oficialaj kaj laboraj lingvoj, ekz. tiuj uzataj por certaj oficialaj publikaĵoj aŭ en konferenceja interpretado, la lingvoj, inter kiuj interpretistoj agas kiel perantoj en la dialogo kaj interkompreno ĉe apartaj kunvenoj de la internaciaj organizaĵoj kiel ITU. Kiel multe pli facile kaj malmultekoste estus, se ni havus nur unu solan komunan lingvon. Eĉ nun, kun la uzado de ses aŭ sep lingvoj, en variaj gradoj, en la sistemo de Unuiĝintaj Nacioj ankoraŭ troviĝas multaj gravaj lingvaj grupoj, kiuj devas uzi fremdan lingvon por komuniki en konferencoj kaj kunvenoj. Jen la graveco de la laboro, kiel tiu de via Asocio, por progresigi komunan lingvon.

Troviĝas, kompreneble, ankaŭ la problemo pri la uzo de lingvo en telekomunikado. La principo, ĝis nun aplikata, estas, ke kompreno inter la korespondantoj sur la lingva nivelo estis tute ĉi ties afero, kondiĉe ke la kvalito de la kunligo estis bona. Ĉu tio daŭre validos en la modernaj telekomunikaj sistemoj restas afero vidota.

Unu el la fruaj oficialaj rekonoj de Esperanto ja estis tiu de la iama Internacia Telegrafia Unio, la antaŭula organizaĵo de la nuna ITU. Estas tre bela koincido, ke estis hungara propono, kiu rezultigis, ke la Internacia Telegrafia Konferenco, kunveninta en Parizo, en 1925, akceptis Esperanton kiel t.n. "klaran" lingvon por la internacia publika telegrafia servo.

Tio estis mejloŝtono kaj ĝi konservis la uzon de Esperanto por komunikado inter homoj, sed vi ĉiuj scias, ke ni nun vivas en mondo, kie lingvoj – ekz. specialcelaj lingvoj ofte bazitaj sur natura lingvo – estas uzataj por direkti maŝinojn. Tio estas temo, kiun vi ĉi tie diskutos dum la venontaj tagoj.

Multaj el tiuj lingvoj estas uzataj por apartaj celoj, kiel komputila programado, rego de ciferuzaj maŝinoj ktp., kaj la bezono de universala lingvo ĉi-rilate eble ankoraŭ ne sentiĝas. La pena serĉado por la ĝustaj vortoj kaj strukturoj, sub la neceso de eksperta kono de la kunteksto, verŝajne flankenigis okupiĝon pri skribado de la maŝine legeblaj instrukcioj en universala lingvo.

Sed tiu situacio validos nur tiel longe kiel la koncernaj taskoj estas rigardeblaj kiel fermitaj, apartaj operacioj. Kun voĉa rekonado kaj artefarita inteligento unuflanke, kaj la uzo de publike alireblaj, komputile bazitaj, kaj aliaj informsistemoj en eksterlando per internacia telekomunikado aliflanke, venos tempo, kiam dialogo inter homoj kaj maŝinoj devos esti bazita sur pli universala kaj pli sisteme strukturita lingvo, ol la lingvoj, kiujn ni kutime uzas.

Vi komprenas, ke mi ne povus sugesti, ke tiun funkcion transprenu Esperanto, sed mi ja rekonas, ke Esperanto havas unikan pozicion inter la internaciaj lingvoj.

De la vidpunkto de universala uzo, estas du aspektoj, kie povus troviĝi eblaj lingvaj baroj al la uzo de novaj sistemoj. La unua estas povi paroli kun la sistemo, doni la ĝustajn instrukciojn kaj ricevi la deziratajn informojn. Tio implicas kaj povi trakti la informojn kaj povi rekoni, cele al elekto de la deziratj informoj, la plej taŭgan priskribilon por tiuj informoj.

La dua aspekto fakte rilatas al utiligo de la informoj el la komputa sistemo.

Estas facile imagi, ke la unua aspekto, la hommaŝina dialogo, estas tiu, en kiu la lingva baro havos la plej grandan influon, ĉar efika dialogo signifas tem-

pouzan funkcion. Ĉi-rilate oni devas rekoni, ke multo estas farebla per simboloj, sed simboloj sur ekrano ne sufiĉas. Kompleze al la uzantoj, tiaj sistemoj devus utiligi sufiĉe altnivelan lingvaĵon por la dialogo.

Oni tuj vidas eblan rolon por universala lingvo; sed oni devas esti realisma; tia sistemo bazita sole sur universala lingvo verŝajne ne estus efektivigebla propono jam en la komenco. Tial eble necesus iri pluan paŝon per dulingva aliro.

Nun kiam la kosto de komputado malaltiĝas, leviĝas la demando, ĉu estus efektivigeble provizi tiajn informsistemojn per enkonstruita tradukfunkcio, tiel ke almenaŭ la serĉ-dialogo povu okazi aŭ en la lingvo de la gastiga lando aŭ en internacia lingvo.

Mi ne scias, ĝis kiu grado vi jam pensas pri la uzo de Esperanto por hom-maŝinaj dialogoj en la reala kunteksto de la novaj internaciaj komunikaj servoj.

Vi, tamen, estas la ekspertoj. Vi unuiĝis ĉi tie por konsideri la utilon kaj la teknikajn aspektojn de la

uzado de Esperanto en la hodiaŭa mondo, kio implicas uzadon ankaŭ en la mondo de modernaj telekomunikado kaj komputiloj. Vi scias la potencialon, kaj mi supozas, ankaŭ la malfacilojn esence proprajn en la uzado de Esperanto en hom-maŝina kunteksto. Sed mi ja sentas, ke vi ĉiuj, via Asocio kaj la vasta anaro de esperantistoj tra la mondo, povas fari tre konsiderindan kontribuon al la antaŭdiskuto de tio, kio sendube iĝos afero de konsiderinda intereso, se – kiel oni devas supozi, se oni kredas je teknika novigado – la hom-maŝina dialogo iĝos grava faktoro en la internacia komunikado kaj transsendado de informoj.

Mi ne rajtas fini ĉi tiun demandon sen diri kelkajn vortojn pri la hom-maŝina dialogo mem. Mi scias, ke multaj el vi, kaj verŝajne tute prave, sentos sin iom maltrankvilaj pri la ideo, ke promesplena aspekto de la estonta uzo de universala lingvo kuntrenus interparoladon kun maŝinoj. Tio ja ŝajnas iom nehoma. Oni devus, tamen, rigardi tiajn maŝinojn pli kiel rimedon, per kiu homoj povas delegi certajn funkciojn al aparato. Ju pli bona estas la teknologio, des pli la aparato povas fari kaj des pli praktika ĝi estos por ni. Spite al ĉio, ĝuste pri tio ni tendencas senti nin iom maltrankvilaj. Sed ni devas esti realismaj: kio eble ŝajnas stranga al unu generacio, tio eble ŝajnos tute normala kaj ĉiutaga al alia.

Sinjoro prezidanto, gesinjoroj, per ĉi tiuj pensoj, inspiritaj de la 21-a jarcento, mi ŝatus gratuli vin pro viaj atingoj kaj deziri al vi ĉian sukceson en viaj klopodoj estigi pli bonajn komunik-eblojn, tiel neprajn por ni ĉiuj.

La konsiderinda nombro de partoprenantoj en via 68a Kongreso, kiu prezentas plian agrablan koincidon de Hungario, UEA kaj la Monda Komunika Jaro kaj sekve ankaŭ ITU, certe ebligos al vi fronti la provokan taskon, kiun vi difinis al vi.

Richard E. Butler,
Ĝen. sekretario de ITU

MALFERMA SOLENAĴO

Planteto iĝis granda arbo

Kiel jam de pluraj jaroj, tiu "dua parto de la Inaŭguro" okazis rapide post la matena solenaĵo, tiel ke la kongresanoj apenaŭ havis tempon tagmanĝi. Parte samtempe kun la Malfermo okazis speciala aranĝo dum kiu kongresanoj povis renkonti la urbanojn de Budapeŝto, kaj senpere post la Malfermo sekvis la Diservo. Ĉio ĉi influis la fakton, ke al la Malfermo venis nur duono de la kongresanoj.

La solenaĵon prezidis Baldur Ragnarsson, kiu poezie prologis pri la 75-jara jubileo de UEA. Tiu jubileo provis stampi la tutan aranĝon, des pli ke ankaŭ alia poeto, William Auld, versis honore al ĝi. Lian poemon (kiu aperas ĉi-kune) elegante interpretis la hungara aktoro Kálmán Szabó.

La tradicia revuo de la salutantoj nome de la landaj asocioj fluis rapide kaj havis jen ekstravagancajn trajtojn (kanada salutanto kun ombrelo kaj vakera ĉapelo), jen tro lertan eluzon de la preskribo pri unufraza saluto (la bulgara frazo daŭris kelkajn minutojn). Venis ankaŭ pluraj salutoj de la movadaj orga-

WILLIAM AULD:

UEA 75-jara

El juna vervo kaj fervoro
Naskiĝis nia Asocio,
Finfine gravis la valoro
Praktika, pli ol teorio:

Servado estis ĝia celo,
De hom' al homo transnacie;
Kial forigo de Babelo
Se ne efiku ĝi socie?

Stariĝis tiam la principo,
Ke Esperanto estas viva,
Ne ia prova prototipo,
Sed homa lingvo efektiva,

Kaj ĝiaj parolantoj frate
Tra l' tuta mondo staris pretaj
Etendi manon karitate
Kun servoj vaste multfacetaj:

Modela mikrokosmo, fakte,
De tuthomara perspektivo,
Pruvanta firme kaj ekzakte,
Ke ĝi ne fontas el naivo.

En UEA ni vidas specon
De mondo paca, sen pogromoj,
Kaj kiel kreas unuecon
Komuna lingvo inter homoj.

Se nin la mondo ne imitos
Kaj false nomos utopio
Nian atingon veran, spitos
Fiere nia Asocio,

Konscia pri l' pruvita vero
De histori' sepdekkvinjara,
Ke nacianojn de la tero
Kunigas amikec' senbara

Sub stelo verda, en socio
Sen lando, jes, sed sen makulo,
La plenumiĝo de l' vizio
De Hector Hodler, la junulo.



Kálmán Szabó deklamas

Sepdek kvin jarojn ni progresas,
Kaj plu progresos absolute,
Ĉar al ĉi tiu mond' necesas
Komuna lingvo sendiskute.

Antaŭen do, kun firma fido,
Potenca kred' kaj forta volo,
En la plenumo kaj valido
De nia historia rolo!

nizaĵoj kaj instancoj, i.a. de Sennacieca Asocio Tutmonda, de la Akademio kaj de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Inter multaj personaj salutoj oni legis ankaŭ tiun de la antaŭa ĝenerala direktoro de UEA, d-ro Victor Sadler.

La duan parton de la Malfermo okupis parolado de la prezidanto de UEA. Ankaŭ tiu parolado estis dediĉita grandparte al la 75-jara evoluvojo de UEA. Maertens honoris la nomojn ne nur de la fondinto de la Asocio, Hector Hodler, sed ankaŭ tiujn de la francoj Alphonse Carles (fondinto de la delegita reto) kaj Théophile Rousseau (organizinto de la unuaj Esperanto-oficejoj). La Kongreso omaĝis ankaŭ tiujn du historiajn figurojn per salonnomo en Budapeŝto.

Provante skizi la historian vojon de UEA, Maertens diris: "Ĝi devis fronti la lingvan kaj la organizan skismojn; ĝi trapasis sektemon kaj baraktis kun la 'ĝisostaj verduloj'; ĝi kreadis idolojn, sed sciis ankaŭ forsendi ilin. En la sino de nia Asocio luktis diversaj tendencoj: la ignore neŭtraleca kaj la pozitive neŭtraleca, la nacia kaj la sennacia, la desuprisma kaj la desubisma, la ambicia kaj la sindona, la oligarka kaj la demokrata. Unuvorte, Universala Esperanto-Asocio restas tute normala – homa – organizaĵo, fandujo de tendencoj kaj ideoj... Mi volas emfazi la kontinuecon de nia Asocio, kiu fidele flegas ĉiun gravan iniciaton tra la tuta 75-jara periodo de sia disvolviĝo. Tial, almenaŭ unuavide, la granda arbo, kiu estas la nuna UEA, tute similas al la planteto de antaŭ 75 jaroj."

La prezidanto dediĉis grandan parton de sia parolado al la nunaj stato kaj vivo de la Asocio. Li aparte emfazis kelkajn trajtojn de la moderna UEA: definitiva tutmondiĝo, larĝa malfermiteco, daŭra plurnivela agado, firma financa bazo. Ĉar tio estas la temoj al kiuj ni ofte revenas en ĉi tiu revuo, ni ne citas el tiuj partoj de la parolado de la prezidanto Maertens.

Kiel kutime, la Malfermo finiĝis per la kantado de "La Espero", kiu ĉi-foje sonis potence, ĉar en la kelkmilvoĉa publiko troviĝis ankaŭ pluraj korusoj, kiuj partoprenis la Kongreson.

Dum la kongresa semajno okazis multaj akceptoj kaj aliaj festaj aranĝoj por diversaj delegacioj kaj grupoj da kongresanoj. La plej amasa el ili estis la oficiala akcepto (por 200 gekongresanoj) en la pompa konstruaĵo de la Parlamento. Tie la gastojn akceptis kaj alparolis la hungara vic-ĉefministro István Sarlós, kiun vi vidas dekstre sur la foto en interparolo kun G. Maertens kaj F. Szabó-Felső.

Foto: Z. Fejér

KOMITATAJ KAJ ESTRARAJ KUNSIDOJ

Sub la signo de la elektoj

En ok kunsidoj de la Komitato de UEA en Budapeŝto ĉefrolis la diversaj elektoj, ĉar la Asocio ĉi-jare voĉdonis pri la nova trijara mandato por ĉiuj oficoj en sia ampleksa strukturo. Kelkaj el tiuj elektoj montriĝis aparte komplika kaj malfacila tasko, tiel ke la publiko havis impreson, ke la Komitato spertas iaspecan konstitucian krizon. Dum la elekto de la nova prezidanto de UEA montriĝis esti preskaŭ rutinaĵo – Grégoire Maertens rikoltis nur unu kontraŭan kaj unu sindetenan voĉojn – tute male, la elekto de la ceteraj estraranoj devis en sep voĉdonoj trarasti la tutan proceduran labirinton por kompletigi la estraran liston, kiun vi trovas sur la dua kovrila paĝo de ĉi tiu revunumero. Kaj, kvankam tie okazis demisioj kaj retiriĝoj, kiujn la konantoj de la asocia historio povus kompari kun la elektoj en Madrido en 1968, temis esence pri la simpla demando, ĉu la Estraro havu ok aŭ naŭ membrojn. Vi nun povas konstati, ke la Estraro por la periodo 1983-1986 estas naŭkapa.

Preskaŭ simile estis pri la elekto de la komitatanoj C, sed tio postulis nur kvar voĉdonojn de la Komitato. Estas evidente, almenaŭ por ekstera observanto, ke la Komisiono pri Elektoj faris ekstreme malbonan laboron sur ĉi tiu kampo.

Malgraŭ ĉio ĉi, la Komitato tamen sukcesis pritrakti ankaŭ amason da aliaj demandoj el sia preskaŭ 50-era tagordo. Ĝi diskutis novstilan Laborplanon de UEA 1983-1987, kiun vi trovos en nia oktobra numero. Ĝi decidis lanĉi Internacian Jubilean Fondaĵon, rezoluciis pri la redakta politiko de la revuo *Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado*, pri landa agado, pri eksteraj rilatoj, informado, faka agado, pri la Jubilea Jaro, planado ktp. – entute 12 rezolucioj, kiuj reflektiĝos tra la venonta periodo en la vivo de UEA kaj sekve ankaŭ en ĉi tiu revuo.

Post ampleksa diskuto, la Komitato akceptis la aliĝon de Kuba Esperanto-Asocio, kiu nun fariĝas la 45a aliĝinta landa asocio en UEA. Tiurilate estas interese aldoni, ke dum la lastaj dek jaroj al UEA aliĝis 11 landaj asocioj, el kiuj 8 estas ekstereŭropaj. UEA

Maksimuma atento al la Jubileo (Rezolucio)

La 68a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta de la 30a de julio ĝis la 6a de aŭgusto 1983 en Budapeŝto, kun 4 834 reprezentantoj el 51 landoj,

studinte la planojn starigitajn de diversaj Landaj kaj Fakaj Asocioj kaj **traktinte** la ĝisnunajn agadojn rilate al la Centjara Jubileo de Esperanto,

konsiderante, ke la Centjara Jubileo prezentos en la venontaj jaroj nepreterlaseblajn eblecojn por atentigi pri Esperanto,

alvokas al ĉiuj Esperanto-organizaĵoj tra la mondo doni prioritaton al laboroj tiurilataj.

nun havas entute 18 ekstereŭropajn landajn asociojn, kompare kun 10 en 1974. Ĉio ĉi bele ilustras la lastatempajn klopodojn tutmondigi la Asocion.

La Komitato akceptis ankaŭ kunlaboran kontrakton kun Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj, nomis novan membron por la Honora Patrona Komitato kaj distingis kvar eminentajn aktivulojn per la honora membreco (vidu detalojn aliloke en ĉi tiu numero).

Kompreneble, la Komitato traktis ankaŭ la estraran laboron dum la pasinta jaro kaj pri tio aŭdis raporton de la prezidanto, kun aparta atento al la evoluo de la asocia kapitalo. La fakto, ke la Komitato "komentis" tiun raporton nur per aplaŭdo (kio cetere estas malofta opiniesprimo en la plej supera organo de la Asocio) devas esti rigardata kiel bela komplimento al la malnova Estraro, kiu, refreŝigita per tri novaj anoj (Despiney, Lindblom, Umeda), gvidos la asociajn laborojn ankaŭ dum la venontaj tri jaroj.

La Estraro (en ambaŭ konsistoj) kunsidis sesfoje en Budapeŝto. Kun la escepto de la lasta kunsido, kiu okazis postkongrese (la 7an de aŭgusto), tiuj kunsidoj konsumiĝis en la pritrakto de diversaj kongresaj demandoj kaj aparta opiniinterŝanĝo kun la reprezentantoj de TEJO, de Ĉina Esperanto-Ligo, de Pola Esperanto-Asocio kaj de LKK por Vankuvero. Unuopaj estraranoj havis ankaŭ amason da aliaj renkontiĝoj, inter kiuj apartan mencion meritas la kunvenoj kun diplomatoj kaj movadaj funkciuloj el Rumanio kaj Soveta Unio, por trakti la situacion pri Esperanto en tiuj du landoj. El la estraraj decidoj, kiuj povus interesi la plimulton de niaj legantoj, ni menciu la principan (do, ne definitivan) akcepton de la invitoj kongresi en 1986 en Pekino, kaj en 1988 en Brisbano (Aŭstralio).

Resti en kontakto kun la moderna komunika teknologio (Rezolucio)

La 68a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta de la 30a de julio ĝis la 6a de aŭgusto 1983 en Budapeŝto, kun 4 834 reprezentantoj el 51 landoj,

traktinte la sociajn kaj lingvajn aspektojn de la moderna komunikado,

konsciante pri la rapidega evoluo sur la kampo de komunika teknologio, kaj pri la graveco rilatigi Esperanton al la modernaj komunikiloj,

konstatinte, ke la sukcesigo de Esperanto grandparte dependos de la kapablo de ties parolantoj resti en kontakto kun la moderna komunika teknologio kaj montri al la mondo kiel ĝi povos esti utiligata por krei pli justan kaj demokratan ordon, en kiu Esperanto ludas esencan rolon,

alvokas al la Landaj kaj Fakaj Asocioj kaj al ĉiuj sciencaj instancoj okupiĝantaj pri la Internacia Lingvo doni pli da atento al komunika teknologio, studi tiun ĉi problemaron, eduki siajn membrojn pri ĝi kaj informi la koncernajn neesperantistajn mediojn pri la perspektivoj de la aplikado de Esperanto en tiu ĉi kampo.

La nova komitato

Kiam oni okupiĝis pri la finredakto de la ĉi-jara Jarlibro, montriĝis, ke estus eble tie aperigi aŭ la malnovan liston de la Komitato (kiu malaktualiĝis en la 68a UK en Budapeŝto) aŭ tre nekompletan liston de la frue nomitaj komitatanoj A. Tial en la ĉi-jara Jarlibro tute mankas la komitata listo. Oni nun planas baldaŭ eldoni apartan adresaron de la Komitato kaj distribui ĝin eventuale kun la nova Katalogo de la Libroservo, se ĝi aperos en la venontaj monatoj. Tamen, ni decidis aperigi ankaŭ ĉi tie la kompletan nomaron de la nova Komitato de UEA. Ĉi-sube la nomojn sekvas indiko pri la lando kaj informo, ĉu temas pri komitatano A, B aŭ C. Jen la listo:

Komitatanoj: T. Agou (Japanio C), M. Andréasson (Svedio A), P. Bagger (Danlando A), E. Barát (Hungario A), V. Benczik (Hungario C), D. Blanke (Germana DR C), W. Bormann (FR Germanio A), T. Bormann (FR Germanio, TEJO A), R. Bossong (Nederlando A), S. Chaves (Brazilo A), F. Cool-Coté (Svislando A), R. Corsetti (Italio A), F. Costa (Portugalio A), C. Cunha (Brazilo A), J.-P. Danvy (Francio A), C. Darbellay (FR Germanio, ISAE A), P. Daŝgupto (Hinda Unio C), A. de'Giorgi (Italio B), L. Demmendaal (Nederlando C), B. Despiney (Francio C), A. Diaz (Britio A), L. Drèze (Belgio A), W. Du Temple (Kanado A), I. Ferenczy (Hungario, UMEA A), F. García Blázquez (Venezuelo B), F. de Geus (Nederlando C), T. Goldman (Usono A), R. Gonin (Francio, LIBE A), Ĥ. Gorov (Bulgario A), U. Grattapaglia (Brazilo B), A. Grzębowski (Pollando A), I. Gulyas (Hungario, IFEF A), J. Hamann (Germana DR A), O. Haszpra (Hungario C), L. Hernández G. (Hispanio A), R. Hirsch (FR Germanio A), Y. Isobe (Japanio A), I. Jackson (Britio A), E. Kehlet (Belgio C), L. Kosieniak (Pollando A), Z. Křimský (Ĉeĥoslovakio A), G. Leon-Smith (Britio B), R. Lindblom (Svedio A), K. Linton (Aŭstralio A), M. Lipari Sato (Italio A), F. Lo Jacomo (Francio B), A. Lukáč (Ĉeĥoslovakio A), E. Majtanić (Aŭstrio A), G. Maertens (Belgio C), E. Matland (Norvegio A), G. Miggas (Greklando A), B. Milićević

(Jugoslavio A), B. Moon (Luksemburgo A), V. Oljanov (Bulgario A), D. Papazov (Bulgario A), F. Patera (Ĉeĥoslovakio A), I. Pethes (Hungario A), B. Ragnarsson (Islando C), M. Resulović (Jugoslavio A), H. Saemundsson (Islando, Obs A), T. Sekelj (Jugoslavio B), So Gil-su (Korea Respubliko A), M. Solís (Argentino A), C. Støp-Bowitz (Norvegio B), S. Świstak (Pollando A), E. Symoens (Belgio A), F. Szabó-Felső (Hungario A), I. Szanser (Pollando A), Z. Tišljar (Jugoslavio C), A. Todorov (Bulgario A), P. Todorov (Bulgario A), H. Tonkin (Usono C), R. Triolle (Francio A), T. Tyynelä (Finnlando A), Y. Umeda (Japanio A), Akiko Woessink-Nagata (Nederlando C), K. Vâlev (Bulgario A), T. Vaskó (Hungario A), B. Venhuizen (Belgio C), A. Wandel (Israelo A), W. Wesełowski (Pollando A), F. Wood (Nov-Zelando A), J. Ye (Ĉinio A), Q. Zhang (Ĉinio A), M. Zvara (Ĉeĥoslovakio A).

Observantoj: M. Almada (Brazilo, UALE O), M. Anda (Meksikio O), C. Beckford (Sud-Afriko O), F. Gabalda (Venezuelo O), J. Hunter (Ĉilio O), C. Mallia (Malto O), M. Mullarney (Irlando O), N. Ngangu (Zairio O).

La Komitato nun konsistas el entute 85 komitatanoj (63A, 7B, 15C) kaj 8 observantoj. Restas unu vaka loko de komitatano A (Kuba Esperanto-Asocio, aliĝinta dum la 68a UK) kaj unu de observanto (Kolombia Esperanto-Ligo).



De maldekstre: Szerdahelyi, Woessink kaj Almada

Novaj honoraj membroj

Laŭ propono de la Estraro, la Komitato de UEA honoris en Budapeŝto kvin elstarajn esperantistojn. Unu el ili fariĝis membro de Honora Patrona Komitato, kaj kvar ricevis la titolon Honora Membro de UEA. Ĉi-kune sekvas kelkaj biografiaj notoj pri la kvin honoritoj.

Ingemund Bengtsson (1919) estas unu el la plej eminentaj svedaj politikistoj. Dum deko da jaroj li estis ministro pri agrikulturo kaj labormerkato, kaj ekde 1979 li okupas la postenon de la prezidanto de la Sveda Parlamento. Bengtsson jam delonge konatiĝis kun Esperanto kaj refreŝigis tiujn ligojn en 1980, kiam li akceptis esti la Alta Protektanto de la 65a UK en Stokholmo. Li plurfoje publike (en amaskomunikiloj) subtenis Esperanton kaj lastatempe komencis ankaŭ aktive uzi ĝin. Bengtsson fariĝas membro de Honora Patrona Komitato de UEA.

Francisco De Souza Almada (1898) estas vaste konata kiel instruanto, informanto kaj organizanto de la Esperanto-movado en Brazilo. Li verkis lernolibron kaj tradukis el la portugala. Almada grave kontribuis al la enkonduko de la instruado de Esperanto en la Universitato de Juiz de Fora. Almada fariĝas Honora Membro de UEA.

Prof. d-ro M.H. Saheb-Zamani (1931) estas vaste konata irana psikologo kaj sociologo, kiu dum multaj jaroj kunlaboris ankaŭ en Monda Organizo pri Sano.

Por pli justa, pli demokrata lingva ordo (Rezolucio)

La 68a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta de la 30a de julio ĝis la 6a de aŭgusto 1983 en Budapeŝto, kun 4 834 reprezentantoj el 51 landoj,

traktinte la sociajn kaj lingvajn aspektojn de la moderna komunikado,

konstatas, ke, kvankam la komunika teknologio prezentas eblecojn solvi mondajn komunikajn problemojn kaj plialtigi la vivnivelon de parto de la homaro, ĝi riskas — se ne juste kaj demokrate uzata — pligrandigi la fendon inter tiuj, kiuj havas kaj tiuj, kiuj ne havas la rimedojn de komunikado. (Tiu risko estas aparte aktuala kiam temas pri la rilatoj inter evolulandoj kaj industrilandoj, sed ĝi ekzistas ankaŭ interne de unuopaj landoj),

atentigas pri tio, ke la teknologia kaj lingva flankoj de komunikado ne estas disigeblaj,

rekomendas al organizaĵoj interesitaj pri komunikado doni pli da atento al la lingvaj dimensioj de la internacia komunikado kaj al la rolo, kiun Esperanto — per siaj facileco kaj neŭtraleco — povus ludi en tiu kunteksto,

alvokas al organizaĵoj, okupiĝantaj pri lingva edukado kaj aliaj lingvaj demandoj, doni pli da konsidero al la rezultoj de la evoluo de la komunika teknologio kaj al ties implicoj rilate la nunan lingvan ordon en la mondo, cele al ĝia plijustigo kaj plidemokratigo.

Li inĝenieris kaj gvidas la senprecedencan disvolviĝon de la Esperanto-movado en Irano. Saheb-Zamani abunde verkis pri la Internacia Lingvo, kaj liaj verkoj aperis en eldonkvanto de pluraj dekmiloj da ekzempleroj. Li fariĝas Honora Membro de UEA.

Prof. d-ro István Szerdahelyi (1924) fondis kaj gvidas la fakon pri Esperantaj lingvo kaj literaturo ĉe la Scienca Universitato Eötvös Loránd en Budapeŝto. En tiu plej renoma universitata fako pri Esperanto jam studis multaj hungaraj kaj alilandaj gestudentoj, el kiuj pluraj doktoriĝis. Szerdahelyi jam de pli ol du jardekoj multe aktivas en la Esperanto-movado, precipe kiel gvida metodologo kaj unu el la plej aktivaj esperantologoj. Pri siaj esploroj li publikigis plurajn librojn kaj verkis amason da artikoloj. Li fariĝas Honora Membro de UEA.

Evert J. Woessink (1910), emerita direktoro de granda kontokontrola entrepreno en Nederlando, estis komitatano de UEA inter 1959 kaj 1983, kaj estrarano de 1960 ĝis 1977. Woessink kunfondis kaj dum multaj jaroj kundirektis Institucion Hodler '68. Li estas ĝenerale rigardata kiel unu el la ĉefaj konstruintoj de la forta financa kaj materia bazo de UEA. Li nun fariĝas Honora Membro de la Asocio.

Foto: Z. Fejér



Eksperimento, kiun necesas daŭrigi: La Komitato antaŭ la publiko en Budapeŝto.

UNUA ĜENERALA KUNSIDO

Publiko en la Komitato

La kunsidoj de la Komitato de UEA jam delonge estis iasence publikaj. Tio signifas, ke la publiko povis ĉeesti en la kunsidejo, sed ĝi ne povis alparoli la Komitaton. En Budapeŝto oni faris plian paŝon rilate la publikecon de almenaŭ unu komitata kunsido. Ĉar la Estrara Raporto pri la agado de UEA ĝis nun diskutiĝis dufoje (en la Komitato kaj en la Unua Ĝenerala Kunsido), la Estraro nun eksperimente kunigis tiujn du kunsidojn, tiel ke la publiko povis ne nur ĉeesti la komitatan kunsidon, kiu traktis la Raporton, sed ankaŭ dialogi kun la Komitato.

Eĉ se tio sonas iom aŭdace, ni dirus, ke en la budapeŝta Unua Ĝenerala Kunsido la publiko montriĝis pli serioza ol kelkaj komitatanoj, kiuj faris bagatelajn aŭ misgvidajn rimarkojn pri la Raporto. Tiaj estis, ekzemple, la rimarkoj pri informaj afiŝoj kaj pri la "lukseco" de ĉi tiu revuo. Se en tiu kunsido leviĝis iom da principaj demandoj de la movada politiko, tiam ili venis pli ofte el la publiko ol el la Komitato. Oni certe devus daŭrigi tiun budapeŝtan eksperimenton pri nova dimensio de la publikeco de komitata kunsido, sed la Komitato mem devus alimaniere pretiĝi por ĝi, tiel ke ĝi ne lasu sin kaptiĝi en la reton de siaj proceduraj reguloj kaj ke ĝi eluzu la aktivan partoprenon de la publiko por diskuti gravajn principajn demandojn, kiuj estas ĉiam facile leveblaj lige al la Estrara Raporto. Sonas ridinde, kiam oni en tiaj kunsidoj diskutas kaj voĉdonas pri la demando, ĉu Kanariaj Insuloj estas en Hispanio.

Rezultoj

Konkursis entute 133 verkoj (poezio 51, prozo 21, teatraĵo tamen neniu, eseo 2, infanlibro 4, fotografio 55), el kiuj la juĝkomisiono premiis jenajn:

POEZIO: la unuan premion oni ne aljuĝis; Dua premio: **L.G. Nordenstorm** (Svedio) pro *Mamuta ĉaso*; Tria premio: **Masayuki Kuroda** (Japanio) pro *Inferon jam ne dusu*.

PROZO: la unuan premion oni ne aljuĝis; Dua premio: **J.S. Veen** (Nederlando) pro *Knabina petolaĵo*; Tria premio: **J.S. Veen** (Nederlando) pro *La fianĉino*; Honoraj mencioj: **Martin Haase** (FR Germanio) pro *Kalemburo* kaj **Spomenka Štimec** (Jugoslavio) pro *Nokta vizito al la kastelo Bosa*.

ESEO (Premio Luigi Minnaja): **Bernard Golden** (Hungario) pro *La mistero de la verda krokodilo*.

INFANLIBRO DE LA JARO: *Nudpieda Gen*, eldonita de Rondo Gen (Tokio).

FOTOGRAFIO: Unua premio: **Karel Stronha** (Ĉeĥoslovakio) pro *Sur karuselo*; Dua premio: **Zoltán Fejér** (Hungario) pro *Vizaĝo 1*; Tria premio: **Song Ke-yep** (Korea Resp.) pro *Monto nebula*; Honoraj mencioj: **Lajos Kapitány** (Hungario) pro *La eterna virino* kaj **Miyosi Tanaka** (Japanio) pro *Go-ludo*.



Supre: B. Ragnarsson, prezidanto de la Konkursoj, kaj la premiito L.G. Nordenstorm. Sube: Ragnarsson transdonas premion al B. Golden (dekstre), veterana partoprenanto de la Belartaj Konkursoj.

Homa menso kiel ĉeftemo

Kontraste al la klopodoj dum la lastaj jaroj, la 36a sesio de Internacia Kongresa Universitato, sub rektoreco de la renoma specialisto pri hidromekaniko Ottó Haszpra (cetere gvidanto de la Scienca Eldona Centro de UEA), okupis sin eĉ ne per unu prelego pri la kongresa temo, "Sociaj kaj lingvaj aspektoj de la moderna komunikado". Anstataŭe iel enpuŝiĝis la homa menso kiel plej forta el la temoj, ĉar pri ĝi okupiĝis tri el la ok prelegoj. "Ĉu la inteligento estas mezurebla? Ĉu heredebla?" de IKU-veterano Helmar Frank (FR Germanio) argumentis kontraŭ troa fido al la tradicia "inteligentec-kvociento" kaj sciigis teorion de la psikogenetikisto Volkmar Weiss, laŭ kiu la homaro dividiĝas en tri grupojn rilate tiun parton de la inteligento, kiu estas plej heredebla. Hans Eichhorn (Germana DR) verve kontraŭstaris la naturscience bazitan neglekton flanke de la korpa medicino al la psika vivo de la paciento, argumentante, en "Medicino aŭ/kaj psikoterapio? (Kuracistoj inter biologio kaj psikologio)", por plena integrigo de la du kampoj. La lastajn esplorojn pri duflankeco de la homa cerbo konigis Béla Mészáros (Hungario) per "La funkcia asimetrio de la homa cerbo kaj ĝiaj konsekvencoj en la edukado".

Vilmos Benczik (Hungario) sukcesis eskapi dum horo siajn ampleksajn devojn kiel LKK-ano por prelegi pri "Influoj de la orient-eŭropa kultura modelo al la evoluo de la Esperanta kulturo", uzante la hungaran literaturan historion kiel ekzemplon por atentigi pri kelkaj frapaj paraleloj, ekz. *Nyugat/Literatura mondo*, Babits/Kalocsay. Simile Esperantan temon havis Hans Joachim Plehn (Aŭstrio), kiu en sia "Biografio de duona vortaro" parolis ne nur pri la granda, nur parte eldonita verkego de Eugen Wüster, *Enciklopedia vortaro Esperanto-germana* (4 vol., ĝis "kor–", 1923), sed ankaŭ pri la posta terminologinormiga laboro de la patro de la esperantologio.

So Gilsu (Korea Respubliko) parolis pri "La ekonomia penso de Konfuceo (551-497 a.K.)", montrante la aprezon kaj respekton, kiujn havis la granda ĉina pensulo por la materia vivo kaj la laboro de metiistoj kaj komercistoj – eĉ se tiun aspekton de lia penso ignoris postaj disĉiploj liaj.

Kaj pri helpo al la bonfarto, materia kaj psika, de estontaj generacioj, okupiĝis la ceteraj du prelegoj. "Kreskigo de kristaloj kiel kontribuo al gajno de

energio el sunlumo" estis la temo de Rudi Hauger (Svislando), kiu parolis pri lastaj laboratoriaj eltrovaĵoj tiukampaj. En "Ekologia 'futurologio': teorio kaj praktiko", Ĥristo Marinov (Bulgario) sciigis pri la uzo de kibernetikaj modeloj por prognozi kaj solvi la ekologiajn problemojn, kiujn estigas kaj spertas la homaro.

crlp

ESPERANTOLOGIA KONFERENCO

Ĉefe pri leksikologio

La 6a Esperantologia Konferenco okazis kadre de la 68a UK. Ĝi konsistis el kvar prelegoj en du sesioj sub la ĝenerala temo "Fakleksiko en Esperanto".

La unua preleganto estis prof. István Szerdahelyi de la Katedro pri Ĝenerala kaj Aplika Lingvistiko de la Scienca Universitato Eötvős Loránd, Budapeŝto. Lia prelego "Enkonduko en leksikologion de Esperanto" elstaris pro sia klareco. Li emfazis, ke sur multaj niveloj Esperanto estas ankoraŭ ne ekzakte priskribita, kio kaŭzas seriozajn problemojn, kiam oni provas prezenti ĝin al profesiaj lingvistoj. Inter tiaj problemoj estas la demando, kiel difini abstraktajn morfemojn.

Li opinias, ke ĉiuj ekzistantaj vortaroj de Esperanto priskribas ĝin iom el la vidpunkto de iu nacia lingvo. Ne plene komprenebla, tamen, estis lia plendo, ke ne ekzistas "norma vortaro" Esperanta! Kiel Szerdahelyi prave substrekis, la ĝusta laboro de la vortaristo estas registri. Vortaro estas provo al priskribo. La sola, reala normo, tamen, estas la komuna lingvaĵo uzata je difinita tempopunkto.

Zamenhof uzis por la ellaborado de sia radikaro la plurlingvan vortaron de Schmidt, sed Szerdahelyi nenie sukcesis ĝin trovi. Zamenhof konstruis sian radikaron laŭ la principo de eŭropa internacieco. En siaj signifosferoj la Esperantaj vortoj, laŭ Szerdahelyi, estas plej ofte plej similaj al la polaj kaj rusaj vortoj. Couturat diris: "Esperanto havas latinidan veston kaj slavan animon". La elekto de nocioj, por kiuj Zamenhof elektis radikojn, spegulas liajn vivocirkonstancojn kiel kuracisto en malriĉa kvartalo.

La posta prelego de A. Vaitilaviĉius (Litovio) pri la ortografio de propraj nomoj ne atingis la sciencan nivelon de la aliaj prezentoj.

La dua sesio komenciĝis per "Enkonduko en la disklasigon de la Esperanta morfemaro" de d-ro R. Rokicki, kiu refreŝige provas esplori vojon al klasifiko de morfemoj iom alian, ol tiu de la Akademio.

Li pritraktis kvar sistemojn por kategoriigo de la Esperantaj morfemoj: tiujn de Drezen, la Akademio de Esperanto, Szerdahelyi kaj si mem. Drezen disdividas la morfemojn en radikajn kaj neradikajn, kaj la radikajn en memstarajn kaj nememstarajn. La Akademio klasifas la morfemojn en radikajn kaj neradikajn, kaj la radikajn en substantivajn, verbajn kaj adjektivajn. Szerdahelyi dividas la morfemojn en radikajn, derivajn kaj fleksiajn, la radikajn en memstarajn kaj nememstarajn, la derivajn en afiksojn kaj la fleksiajn en vortklasajn kaj kategoriajn. Rokicki klasifas la morfemojn en neligeblajn kaj ligeblajn, la ligeblajn en memstarajn kaj nememstarajn, la nememstarajn en nesintaksajn kaj sintaksajn, la nesintaksajn en nederivajn kaj derivajn, la nederivajn en radikajn kaj afiksoidajn, kaj la sintaksajn en kategoriajn kaj fleksiajn. Prof. Szerdahelyi protestis, ke en Esperanto principe ne ekzistas nekombineblaj morfemoj.

D-ro Balázs Wacha, esploristo el Budapeŝto, finis la serion per prelego pri la aspekto kaj tempo en Esperanto. Li konstatis, ke al la tempokategorio kontribuas ne nur verbotempoj sed ankaŭ adverboj kaj interjekcioj. La tempistoj ofte konfuzas imperfektivecon kun longdaŭreco.

Kvankam ĝi estis por multaj ĉeestantoj aparte interesokapta kaj kompetenta prelego, Wacha provis prezenti tro multe, tro rapide kaj tro komplike, tiel ke li dronigis sian aŭskultantaron en ofte malfacile digesteblan faktaron. Tia prelego taŭgas nur en skriba formo aŭ antaŭ studentoj, jam preparintaj la temon. Balázs Wacha jam estas tre atentinda nomo inter kompetentaj esperantologoj.

La konferenco, kiu en antaŭaj jaroj estis tre sukcesa programero en la UK, ĉi-jare "degeneris" al prelegaro. Preskaŭ ĉiu preleganto plenŝtopis sian tempon, kio plej ofte malebligis demandadon. Mankis vera grupigo de prelegoj ĉirkaŭ temo, des pli ke neniu atentis la anticipe fiksitan ĝeneralan temon.

Prof. Szerdahelyi sendube pravas, ke oni ne sufiĉe traktas prilingvajn demandojn en niaj kongresoj, sed la graveco de tiaj demandoj meritas ankaŭ vere konferencecan kunsidon ĉirkaŭ klare difinita temo, kiun unuavice prelegantoj devu atenti.

Geoffrey Sutton
kaj **W.A. Verloren van Themaat**

ATENTIGO: Pro la amplekso de la ĉefa inaŭgura parolado kaj de kelkaj aliaj tekstoj, montriĝis neeble meti en ĉi tiun revunumeron la tutan raporton pri la 68a UK. Tial vi trovos plurajn prikongresajn tekstojn en la oktobra numero de nia revuo. Tiuj tekstoj jam estas prespretaj, kaj la numero baldaŭ sekvos. Dankon pro via komprenemo!

Fotoj: Z. Fejér



La nombre kaj fare granda LKK akceptas dankojn kaj aplaŭdojn sur la podio. Dekstre: Budapeŝto transdonas la flagon al Vankuvero.

SOLENA FERMO

Digna fino de granda Kongreso

El la tri ĝeneralaj kongresaj solenaĵoj, la Fermo estis la plej neta, ĝia teknika fluo la plej spontana. Tie sendube rolis ankaŭ iom da psikologiaj faktoroj, ĉar la kongresanoj, same kiel la podianoj, jam havis malantaŭ si sukcesan kaj eksterordinaran kongresan semajnon.

Post la enkonduko kaj raporto pri la kongresaj laboroj (fare de la prezidanto kaj ĝenerala sekretario), Maertens anoncas la komitatan decidon pri la novaj honoraj membroj. Li invitas al la podio la ĉeestantajn honoritojn (Almada, Szerdahelyi, Woessink), transdonas al ili simbolajn librodonacojn kaj petis, ke ili restu sur la podio.

La ĉina delegacio (plej multnombra dum la lastaj jaroj) havis en la Solena Fermo apartan kialon ĝoji, ĉar oni tie transdonis al Ĉina Esperanto-Ligo la Trofeon Fyne, kiun la Estraro de UEA aljuĝas ĉiun duan jaron al la plej bona landa asocio. En sia klarigo de la estrara decido, d-ro Corsetti diris: "Ĉina Esperanto-Ligo en relative mallonga tempo sukcesis vaste pliigi la agadon por la disvastigo de Esperanto tra la tuta lando, tiel ke en la lastaj jaroj ĝi fariĝis la plej dinamisme kreskanta landa movado. Kvankam inter la laste aliĝintaj landaj asocioj, ĈEL estas unu el la plej modele kunlaborantaj. La perfekta kunordigo de la agadoj kaj la daŭra bonetosa konsultado inter la estraroj de UEA kaj ĈEL povas servi kiel ekzemplo por la tuta Movado."

Post la prezento de la kongresaj rezolucioj (ĉiuj aperas aliloke en ĉi tiu numero), venis la kutima dankovico, kiun ĉi-foje faris la prezidanto Maertens kaj la nova estrarano pri kongresoj Roland Lindblom. Kvankam la 68a UK bezonis (kaj havis) pluroble pli da helpantoj ol niaj antaŭaj kongresoj, oni ne venis al la ideo voki ĉiujn sur la podion, kio kompreneble ne signifas maldankemon sed simplan atenton al la laca kongresa publiko. Pro tio al la podio estis vokitaj nur la membroj de LKK, kiuj ricevis florojn kaj vere merititajn dankojn de la Estraro kaj de la tuta kongresanaro.

La prezidanto de LKK por la venontjara Kongreso en Vankuvero (Kanado), W. du Temple, devis senti iom da embaraso, kiam li invitis al partopreno en la 69a UK, kiu certe estos tre malsimila al Budapeŝto. Ĉi-foje la transdono de la granda Kongresa Flago okazis nur simbole, ĉar tiu fama tolaĵo ankoraŭ pendis super la podio. Eble tiel konvenas agi ankaŭ dum la venontaj kongresoj.

Tiam la scenejon suriris Internacia Esperanta Koruso, kiu jam de kelkaj jaroj funkcias sub la gvido de la bulgara muzikisto D. Terziev. Denove la Koruso beligis la finan kongresan scenon, kiun buntigis ankaŭ kelkdeko da geknaboj el la Internacia Infana Tendaro, kun floroj por la podianoj. La tradicia himnokantado signis la definitivan fermon de la plej granda kongreso en la historio de la Internacia Lingvo.

Kontribuojn sendu al la ĝenerala sekretario de TEJO: N. Saletti, Via Libia 20/4-1, I-40138 Bologna.

39a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO

Serioze labori kaj serioze amuziĝi

La kalvinana urbo Debrecen, en orienta Hungario, gastigis ĉi-jare la 39an Internacian Junularan Kongreson (IJK). La inviton akceptis 672 homoj el 35 landoj, kiuj venis por diskuti pri "Informfluo en la nuntempa mondo" en la moderna kongresejo de Debrecen, kaj – kompreneble – por ĝui la kutiman junecan etoson de IJK. Sed la ĉi-fojan etoson ĝenis kelkaj malglataĵoj: ekz. kelkaj loĝejoj estis vere for de la kongresejo, kaj oni bezonis 45-minutan vojaĝon por atingi ĝin. Alia malglataĵo (por tiel diri) estis la "partopreno" de granda karavano da... neesperantistaj gejunuloj, kies nekompreno de la lingvo tre malfaciligis la komunikadon. Oni povas aserti, ke ĉi-jare IJK spertis lingvajn problemojn, kaj la "informfluo" ofte ne fluis. Klare, TEJO klopodos eviti la ripetiĝon de tiaj malglataĵoj, jam ekde la venonta IJK, kiu okazos en Swanwick (Britio) de la 13a ĝis la 20a de julio venontjare, kun la temo "Homo kaj maŝino".

Tamen, la Kongreso ne havis nur malglataĵojn. Multaj eroj de la programo optimume disvolviĝis kaj kontentigis la partoprenantojn: pluraj prelegoj pri la kongresa temo, ekzemple, aŭ la teatraĵoj, aŭ (iom malpli) la Hungara Vespero (teatraĵo, dancoj kaj kantoj, iom ĝenita de la legado kaj tradukado de longa mesaĝo de packomitato).

La Internacia Vespero tre glate marŝis, kaj nur je la fino oni rimarkis, ke ĝi daŭris 5 plenajn horojn! Inter skeĉoj, dancoj, prezentoj de venontaj IJKoj, kanzonoj, poemoj, la tempo gaje flugis, kun nur eta problemeto: la teatro povis enteni nur 450 homojn, kaj la ceteraj havis nur la eblecon rigardi la spektaklon pere de interna televido. Malgraŭ tio, la Vespero bone marŝis, kaj ĝi eble restos unu el la plej memorendaj eroj de tiu Kongreso.

Trafoliumante mian notlibron, mi retrovas aliajn aferojn: agrabla estis la ekskurso al la pusto Hortobágy, kie la kongresanoj ĝuis vojaĝon sur ĉaroj tra la nekredeble ebena pusto, futbalkonkurson kaj grandan lacigan varmon. Kelkaj sukcesis rajdi ĉevalon, kaj oni spertis bredistan spektaklon. Kelkaj kongresanoj iris ekskurse al iu banejo, kaj mi iomete enviis ilin, ĉar tiel ili sin savis de la terura varmo.

Banejo igis aparta ankaŭ alian programeron: temas pri la "Baneja Balo", kiu okazis en basenoj kun varma kaj malvarma akvoj. Tie okazis ankaŭ la sinprezento de la nova TEJO-estraro, kiu longe skeĉis pri si kaj pri la pasinta estraro. La novaj estraranoj tuj kaptis la okazon komprenigi al la nova prezidanto, ke oni devas demokrate regi gravan asocion kiel TEJO, kaj por ke tiu ĉi koncepto pli efike restu en lia menso, oni ĵetis lin en basenon (jes, li havis bankostumon, sed bedaŭrinde la estraranoj ne tro atentis, kaj ĵetis lin en la plej malvarman akvon).

La lasta vespero, tradicie konata kiel "Adiaŭa Vespero", iĝis iom post iom "adiaŭa nokto", kaj iom poste „adiaŭa mateno", ĉar ĝi finiĝis je la 6a kaj duono matene (por mi, almenaŭ).

Sed oni ne kredu, ke la 672 partoprenintoj el 35 landoj (inkluzive la menciitajn neparolantojn) venis al Debrecen nur por amuziĝi. IJK estas la baza forumo de TEJO, kaj dum ĝi renkontiĝas la Komitato kaj la Estraro de la Organizo. Tiu ĉi jaro estis en TEJO, kiel en UEA, elektojaro. Ĉiun duan jaron, TEJO renomumas siajn estraranojn, kaj post intere-

saj diskutoj, oni nun elektis ok homojn, plejparte unuafoje en la Estraron. Sed ne kredu, ke ili estas movade tute naivaj: La prezidanto de TEJO por la venontaj du jaroj estos Ian Jackson (Britio). La ceteraj estraranoj (pri kies fakoj ktp. vi legos en la venonta numero de *Esperanto*) estas: Martin Haase (FR Germanio), Zsófia Kóródy (Hungario), Jan Koszmaluk (Pollando), Neven Kovačić (Jugoslavio), Norberto Saletti (Italio), André Staes (Belgio) kaj Marie Vančurová (Ĉeĥoslovakio).

La Komitato plurfoje kunsidis, kaj en siaj kunvenoj atingis plurajn gravajn aŭ/kaj interesajn decidojn. Kelkaj rilatas estontan kunlaboron inter pluraj landaj sekcioj el orienta Eŭropo kaj TEJO, por faciligi la partoprenon en IJK kaj aliaj kunvenoj al homoj el netranspagipovaj landoj: temas pri interŝanĝo de partoprentagoj laŭ difinitaj kondiĉoj, kio certe helpos al la vastigo de la kunlaboro inter landaj sekcioj.

La Komitato atentis la raportojn de la konstantaj komisionoj, kaj nomis novajn, pere de kiuj oni agas dum la jaro. Se vi interesiĝas pri unu el la pluraj agadoj de TEJO, turnu vin al mi (adreso komence de tiu ĉi artikolo), kaj mi ligos vin kun la koncerna homo: TEJO estas asocio de ĉiuj siaj membroj, kaj ne nur de la malmultaj homoj kiuj subskribas artikolojn, aŭ de la same malmultaj kiuj verkas laborplanojn. La IJK estas la plej taŭga maniero vidi la ekziston de la juna Esperanta komunumo, en kiu estas loko ankaŭ por vi. Alia decido rilatas la novan redaktoron de la TEJO-parto en la revuo *Kontakto*: la nova homo estas Leif Gunnar Nordenstorm (Svedio).

Aliaj decidoj... Tamen, tio laŭ mi sufiĉas. El la ĉi-supraj linioj, oni klare povas kompreni, ke la nuntempa junularo (aŭ almenaŭ granda parto de ĝi) emas labori serioze, samkiom ĝi emas amuziĝi. Mi kredas, ke tio ja estas tre bona deirpunkto por la Jaro de la Junularo, kiu disvolviĝos en 1985. Ek al la laboro, kaj ĝis revido en Swanwick (espereble kun malpli da "krokodiloj")!

Norberto Saletti

JUNULARAJ ARANĜOJ EN BUDAPEŜTO

Katido kaj satiro

Kiel tradicie, ankaŭ en la 68a UK okazis tri apartaj junularaj programoj: TEJO sin prezentas, Junulara Vespero kaj Junulara Debato. Dum la unua el tiuj programoj konsistis el la kutimaj elpaŝoj de la estraranoj de TEJO (spite la fakton, ke pluraj estis novicoj, ĵus elektitaj en la 39a IJK), la du aliaj aranĝoj estis freŝetosaj kaj meritas apartan prikonsideron.

Tute neatendite, antaŭ la nepre bezonata dancado en la Junulara Vespero, la 3an de aŭgusto en la salonego Zamenhof, oni ekprogramis: humuraĵoj de S. MacGill, bela dancado de polaj knabinoj kaj interprogramera petolado de la katido Pusztavacs, kiu simile rolis ankaŭ en Debrecen. Sekvis... "Solena Inaŭguro" kaj "Malfermo" de la UK. Jes, vi ne eraris, tiuj du komencaj kongresaj aranĝoj revenis al la sama scenejo, sed nun en alia varianto, kiu humure primokis la solenecon, longecon, seriozecon kaj enuigan etoson de tiuj aranĝoj. La rolojn de la estraranoj de UEA ĉi-foje plenumis (pli aŭ malpli sukcese) la estraranoj de TEJO.

La sekvantan tagon, dum la Junulara Debato, estiĝis vigla diskuto pri tiu satira parto de la Junulara Vespero. Leviĝis pluraj superfluaj demandoj (Ĉu la junularo rajtas kritiki la Estraron de UEA?) kaj kelkaj pravaj atentigoj, ke ĉiu sana kritiko devus observi iajn limojn, kiuj malhelpu publikan ridindigon de personaj trajtoj, sed ne baru primokon de eraraj movadaj elpaŝoj. La kritikado do estas bonvena, sed ĝi provu esti konstrua kaj pli bone pripensita kaj pripesita, ol estis tiu en Budapeŝto.

La Debaton gvidis la nova prezidanto de TEJO, Ian Jackson. Ceestis tamen nur trideko da personoj, kaj la salono Kalocsay duone malplenis. Proksimume nur triono de la ĉeestantoj diskutis, ankaŭ ĉi-foje pri la generacia demando en la Movado. Franco bedaŭris, ke en tiu lando mankas kunlaboro inter la junulara kaj pliaĝula organizaĵoj; sovetiano atentigis, ke ĉe ili tia demando ne leviĝas, ĉar la landa organizaĵo konsistas plejparte el gejunuloj. Al la demando, ĉu la movada junularo estu konsiderata kvazaŭ ia "netuŝebla objekto" sur kies kolo pendas atentigo, ke ĝi estas "la estonteco de UEA", venis negativa respondo. La junularo estas ankaŭ la nuntempo, ne nur la estonteco. Aŭdiĝis laŭdoj pri la laboro de la Kastora Klubo kaj mallaŭdoj pri artaj aranĝoj dum TEJO-kunvenoj.

Ni revenu al la Junulara Vespero, por diri, ke ĝi estus malsukcesa sen hazarda apero de K. Henriksen (Danlando) kaj M. Englund (Svedio), kiuj per sia kantado ne nur entuziasmigis la publikon sed ankaŭ kantigis ĝin. Tiel la memorinda etoso de Debrecen almenaŭ mallonge spertiĝis ankaŭ en Budapeŝto.

Valentin Seguru

Kongreseroj...

● **Vojo por malgajni Patronojn:** Neniu malkonsentas, ke la idealoj kaj idoloj de la juna movada generacio povus malsami al tiuj de la pliaĝuloj. Tamen, kiam TEJO en la Junulara Vespero en Budapeŝto prezentis obscenan parodion de "La Espero", multaj el la ĉeestantaj miloj da kongresanoj sentis (kaj diris), ke tiu ago transpaŝas la limojn de bona gusto kaj tolereblo. Ni supozas, ke la estraranoj de la junulara sekcio de UEA, kiuj ĉeestis tie, ne konsciis, ke tio estas la plej efika maniero por malgajni plurajn Patronojn de TEJO.

● **Funda apliko de reguloj:** Kvankam centoj da esperantistoj trovis sian manieron partopreni la 68an UK sen oficiala aliĝo, estus maljuste aserti, ke pri tio kulpas la severaj kontrolistoj ĉe la eksteraj pordoj de la kongresejo. Ilian skrupulan aplikon de la reguloj spertis ankaŭ gvida funkciulo de UEA, kiam li aperis sen la kongresa insigno ĉe unu el la enirejoj. Ne helpis provoj klarigi al la kontrolisto, des pli ke rolis ankaŭ la lingva problemo. Fine preterpasis hungara ĵurnalisto kaj informis la kontrolriston, ke la seninsigna homo iasence mem ordonis tiel severan kontrolon. "Nu, bone por ĉi tiu fojo, sed...", komentis la deĵoranto.

● **Virina saŭno:** Pro la grandeco (kaj labirinteco) de la kongresejo en Budapeŝto, la organizantoj ofte uzis laŭtparolilojn por trovi la bezonatajn homojn. Aŭdiĝis tie enigmaj sed ankaŭ amuzaj vokoj. Ekzemple: "S-ino Ada Cziszár atendas kelkajn fortajn virojn ĉe la virina saŭno." Seso da tiaj rapidis al la indikita loko, sed montriĝis, ke la saŭno nun estas deponejo de pakaĵoj, kaj la respektinda prizorgantino de la manuskripta heredaĵo de Kalocsay bezonis transportan helpon.

● **Doganejo:** Usona kaj nederlanda gekongresanoj venas kune, postkongrese, al flughavena doganisto. "Kiom da forintoj vi havas?", demandas la oficulo. La usonanino montras malplenan monujon, la nederlandano elprenas 150 forintojn (ĉ. 10 gld) el la poŝo. "La maksimumo eksportebla estas 100 forintoj", klarigas la doganisto kaj petas reiri al bufedo kaj elspezi 50. "Sed ĉi tiuj 100 estas ŝiaj", diras la nederlandano kaj donas la monbileton al la usonanino. Ĉiuj tri ekridas.



Foto: R. Haddon

● **Aresto:** La sola dumkongresa "aresto" pri kiu ni aŭdis, estis tiu, kiun spertis Humphrey Tonkin kaj kelkaj aliaj funkciuloj de UEA. Dum ili kunsidis en la ĉambro rezervita por UEA, iu ŝlosis la apudan oficejon tra kiu ili atingis la kunsidolokon. Kiam Tonkin k.a. finis la kunsidon, montriĝis neeble forlasi la ejon. Eĉ helpokrioj ne helpis, ĉar ĉiuj kongresanoj estis longe for, supre en la salonego. Fine la plej juna el la "arestitoj" elgrimpis tra fenestreto kaj post kvaronhoro revenis kun la ŝlosilo. Unu el la "arestitoj" faris la ĉi-kunan foton, kiu montras la vicprezidanton Tonkin en ties klopodoj elsendi S.O.S.-signalojn al la ekstera mondo.

● **Vilaĝ-kongreso:** La bonvenigaj slogantukoj multloke tra Budapeŝto estis dulingvaj: en Esperanto kaj en la hungara. Sed la hungarlingva nomo de la 68a UK – Eszperantó Világkongresszus – al multaj esperantistoj legiĝis kiel "Vilaĝ-kongreso", kun la supersigno erare migrinta de g al a. Tamen, *világ* estas la hungara ekvivalento de *mondo*.

● **"Buda pesto":** En Budapeŝto iu tiel vortludis (tio ŝajne estis la usona prof. Sherwood) pri la nomo de la hungara ĉefurbo. La celo tamen neniel estis malkomplimenti la gastigantan urbon sed aludi la lingvo-problemon kaj la "peston" de la interpretistaj "budoj". Aliflanke, kiel vi vidas en aparta ero ĉi-paĝe, dum la 68a UK oni ne uzis budojn, sed la interpretistoj sidis en koridoro.

● **Unu tamen mankis:** Al la komforto de la kongresejoj grave kontribuas la nombro kaj kvalito de, interalie, necesejoj. Ankaŭ tiurilate Budapeŝto rekordas, ĉar ni ne memoras kongresejon kun tiel malmultaj kaj malvastaj liftoj, kaj tiel multnombraj kaj vastaj necesejoj. Tamen, daŭre sentiĝis la manko de unu el ili: tiu apud la Salono Baghy, ĉe kies pordo sidis la interpretistoj de la kongrestema konferenco. Pluraj viroj protestis.

Foto: A. Wandel



● **Malsovaĝa tendaro:** Dekoj da gejunuloj, kiuj iris al Debrecen kaj Budapeŝto, kunportis tien siajn ĉiaspecajn tendojn kaj starigis ilin en ĉiu libera angulo ĉirkaŭ la domoj de siaj hungaraj geamikoj — senkoste, kompreneble.

Post la originala *Hungara antologio* de 1933 nun fine aperis la nova, lukse bindita eldono de

Hungara antologio

Pli ol 200 literaturaj pecoj de la plej famaj hungaraj aŭtoroj. Kompilita kaj kun ampleksa enkonduko de Vilmos Benczik.

Eld. Corvina Kiadó, 1983. 448 p. 24 cm. Bindita kun kvar-kolora kovrilo. ISBN 963 13 1625 4.
Mendu ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Prezo: 57,00 (por Ned. 59,28) gld. plus sendokostoj.

"Tiu ĉi nova *Hungara antologio* pluetendas... la gamon prezentitan en la unua, kaj same entuziasme ni voras ĝin..."

William Auld

Eldonejo - librejo SONORILO

- **L'espéranto dans l'enseignement:** d-ro Pol Denoël. 1982 (2a eld). 30p. 23cm. Informbroŝuro pri Esperanto kaj ĝia instruado. 100 BF.
- **Initiation théorique et pratique:** d-ro Pol Denoël. 96p. Ilus. 22cm. Bind. Gramatika lernolibro kun bonaj klarigoj, plej taŭga por publikaj kursoj. 180 BF.
- **Aerpoŝtaj leterpapero kaj kovertoj,** kun surpresitaj stelo kaj la vorto "Esperanto". Pakaĵoj de 50 folioj aŭ 50 kovertoj: 145 BF.
- **Gluafiŝo: Internacia Lingvo Esperanto,** kun homa figuro kaj verda stelo. 7 × 17 cm. 25 BF.
- **Novjaraj gratulkartoj:** kvar diversaj koloraj kartoj (kun kovertoj) en kvin lingvoj. Dua eldono. 60 BF.
- **Leksikono de Bovy:** J.P. Bovy. Herstal: APE, 1982. 105p. Mimeo. 21cm. Vortareto en kvin lingvoj (Esperanto, angla, franca, nederlanda, germana). 240 BF.
- **Eldonejo-Librejo SONORILO** estas peranto de: *Budapeŝta informilo, El popola Ĉinio, Heroldo de Esperanto, Monato, Norvega esperantisto, Oomoto*. Petu abonprezojn en via nacia valuto.
- **De la 5a de okt. 1983 ĝis la 1-a de marto 1984** nia Librejo aŭtomate donas rabaton de 5%, se via mendo superas la valoron de 500 BF (ekskluzive la sendokostojn). Ni vendas pli-malpli ĉion momente disponeblan en la Esperanta libromerkato. Al ĉiuj netaj prezoj de libroj aldoniĝas sendokostoj: 20% por la mendo sub la valoro de 1800 BF, kaj 10% por la mendoj de pli granda valoro. Niajn eldonaĵojn vi povas mendi ĉe la Libroservo de UEA, ĉe via kutima landa liveranto aŭ rekte ĉe:

Eldonejo-Librejo SONORILO, Doornstraat 22,
B-2610 Wilrijk (Antwerpen)
Belgio. ☎ (03) 827 24 05.
Ni estas konataj pro malaltaj prezoj kaj rapida servo!

Ĉu vi havas ion por diskonigi al ĉiuj en la Movado?

Se jes, la plej simpla kaj la plej malmultekosta maniero por atingi tion estas anonci en ĉi tiu revuo. Memoru, ke la revuon legas pli ol 10 000 homoj en pli ol cent landoj. Rerigardu al nia tarifo de anoncoj (sur la dua kovrila paĝo). Ne valoras cirkuleri al cent homoj, se vi por la sama mono povas per anonco atingi centoble pli vastan publikon!

John Wells: Lingvistikaj aspektoj de Esperanto

Rotterdam: UEA/CED, 1978. 76p. 23cm. ISBN 92 9017 021 2. Scienca analizo de la lingvistikaj aspektoj de Esperanto: fonetiko, morfologio, sintakso, leksiko kaj semantiko. Kun bibliografio kaj indekso de terminoj. Prezo: 12,00 gld.

jam kompletigita plena verkaro de zamenhof?

Nu, preskaŭ! Aperis ĝis nun dek dikaj, luksaj volumoj. La tuto estas aĉetebla kiel kompleto por 390,00 gld. La unua volumo (*unuaj libroj por esperantistoj*) ne plu aĉeteblas ekster la kompleto. Aliaj 9 haveblas unuope (po 39,00 gld). Aperis ankaŭ du "kromkajeroj" (po 33,00 gld). Mendeblaj do estas: ■ *la inkunabloj de esperanto* ■ *ni laboru kaj esperu!* ■ *antaŭen al la laboro!* ■ *tamen la afero progresas!* ■ *hebreo el la geto* ■ *kun gradaj paŝoj eksterlanden!* ■ *klopodis organizi, sed vane!* ■ *por kaj kontraŭ reformoj!* ■ *mortinta, sed senmorta!* ■ Kromkajeroj: ■ *senlegenda biografio de l.l. zamenhof* ■ *korespondaĵo ludovikologia* ■ Ĉio ĉe: uea, jei, kleg.



eldonejo ludovikito

KONGRESAJ INSIGNOJ DE VANKUVERO

Por reklami la 69an Universalan Kongreson, okazontan venontjare en Vankuvero (Kanado), LKK pretigis limigitan kvanton da oficialaj kongresaj insignoj en speciala eldono. Ili estas unika kanada fabrikaĵo el arĝentita kupro, en proksimuma grandeco de 22 × 17 mm. La insigno montras la kongresan simbolon (indianan totemfoston), la vortojn "69a UK de Esperanto" kaj la verdan stelon en la fono.

La insignoj estas jam nun haveblaj: **kvante** (minimume 10 ekz.) ĉe LKK (53 North Boundary, Vancouver, B.C., V5K 3S4) kontraŭ 3 kanadaj dolaroj por ĉiu ekzemplero, plus 10 % por la sendokostoj; **unuope** ĉe la Libroservo de KEA (765 Braemar, R.R.2, Sidney, R.C., V8L 3S1) kontraŭ 4 kanadaj dolaroj, plus 10 % por la sendokostoj. Ankaŭ pluraj aliaj libroservoj vendas la insignon. Krome, **nur ĉe LKK** estas havebla tre limigita kvanto da purarĝentaj insignoj kontraŭ 10 kanadaj dolaroj, plus 3 kan. dolaroj por afranko kaj poŝta registro.

Jen postmorte la vivoverko de la iama vicprezidanto de la Akademio, elstara esperantologo.
Inter la temoj, kiujn traktas ĉi tiu kolekto de esperantologiaj eseoj troviĝas ankaŭ la jenaj:

- Fonetiko; Vortfarado; Prepozicioj
- Sinonimoj kaj homonimoj en Esperanto
- La arto traduki; Propraj nomoj
- La elementoj de Esperanto, ĉu arbitre elpensitaj?
- Onomatopeoj en Esperanto.

La lingva esenco de Esperanto, de Atanas D. Atanasov (1892-1981). Rotterdam: UEA, 1983. 176 p., 21 cm. ISBN 92 9017 024 7. Prezo: 27,00 gld. plus sendkostoj. Sur luksa papero, kun eleganta kovrilo el plastumita kartono. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.

Tiel varbas legantoj de MONATO por MONATO:

Monato sen Monato ŝajnas preskaŭ jaro

Julie Tonkin

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL

MONATO estas la alternativa revuo, ĉiuaspekte. 40 paĝoj, riĉe ilustrita.

Konvinkiĝu mem, petante provekzempleron ĉe la eldonejo: TK/STAFETO, Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat, Belgio, kontraŭ du internaciaj respondkuponoj (sed vi povas fari tiun peton nur unufoje!).